

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

103-a jaro • n-ro 1234 (3) • **Marto 2010**

EEU renkontis en Bruselo la prezidanton de Eŭropa Parlamento



**Mil lernantoj
en Vieno**

**Kongresa
komuniko 2**

**Gvidlibro de
la amikeco**

**Kalendaro
2010 – 2011**

Esperanto

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788
✉ revuo.esperanto@gmail.com;
redakcio@gmail.com

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 38);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.

Anonctarifoj (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.
Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe ING-bank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL72INGB0000378964
BIC: INGB NL2A)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
BIC: ABNA NL2A).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
☎ +31-10-436-1044,
✉ uea@co.uea.org
TTT: www.uea.org

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Enhavo

- 51 ... Malferme: Vieno: Mil lernantoj intimiĝas kun Esperanto (J. Schallock)
- 52 ... Kongresa komunikado 2
- 53 ... Kongresa temo: Interproksimigo de kulturoj (Duncan Charters)
- 54 ... Reagoj: Ĉu troviĝas loko por danki al Anna? (Anna-Liisa Ali-Simola);
Facileco de la lingvo gravas (Nobuo Sakurai); Pri poeziaj terminoj
(Ji Yin'geng)
- 55 ... Facila kaj samtempe riĉa (Hori Jasuo); Ĉu neologismoj kaŝas mankon
de talento? (Kees Ruig); Kiaj vortoj estas simplaj? (Kris Long); Literatura
lingvo kaj vortprovizo (Erkki Röntynen)
- 56 ... Gvidlibro de la amikeco (Mariana Genčeva); Einstein-liceanoj en la CO.
- 57 ... Ivo Lapenna: kelkaj detaloj etaj sed signifaj (Marjorie Boulton);
UEA en Interreto
- 58 ... Libroservo de UEA en 2009: Katalin Kováts duobla ĉampiono
(Osmo Buller)
- 59 ... Kalendaro 2010-2011
- 63 ... Recenzoj: Ĵak Le Puil pri *Antigona*; Baldur Ragnarsson pri *Vespere*
- 64 ... Gerrit Berveling pri *Renardo Vulpo*
- 65 ... Lasta aperis
- 66 ... Esperanto en plia libro (IO)
- 67 ... Oficiala informilo
- 68 ... EEU renkontis en Bruselo la prezidanton de Eŭropa Parlamento
(Seán Ó Riain)
- 69 ... Ekspozicioj en Finnlando (Tiina Oittinen)
- 70 ... Forpasoj

KOVRILPAĜE: La 13-an de januaro 2010 renkontiĝis, por festi la 150-an
naskiĝdatrevenon de L.L. Zamenhof, delegitaro de Eŭropa Esperanto-Unio
kun la prezidanto de Eŭropa Parlamento Jerzy Buzek (legu pli sur la paĝo 68).
Foto: Eŭropa Parlamento.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

**Prezidanto (kunordigo, ĝenerala
planado):** Prof. Probal Dasgupta, LRU,
Indian Statistical Institute, 203 B.T.
Road, IN-700108 Kolkata, Barato;
☎ +91 33 2359 7731;
✉ probal53@yahoo.com.

**Vicprezidanto (kulturo, kongresoj,
edukado):** S-ino Claude Nourmont,
2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim,
Luksemburgo; ☎ +352 23 66 88 64;
✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala Sekretario (informado):
S-ino Barbara Pietrzak, Ul. Między-
narodowa 38/40a m 217, PL-03-922
Warszawa, Pollando; ☎ +48 22 252 79
21 [h], ✉ +48 6000 51 425;
✉ bpietrzak@onet.eu.

Financo, administrado, TEJO: S-ino

Loes Demmendaal, Duikerlaan 160,
NL-2903 AC Capelle aan den IJssel,
Nederlando; ☎ +31 10 213 33 20;
✉ l.a.demmendaal@planet.nl.

Landa kaj regiona agado: S-ro Hori
Jasuo, 10-27 Simosinden-mati 10-27,
JP-371-0822 Maebasi-si, Gunma-ken,
Japanio; ☎/✉ +81 27 253 2524;
✉ horizon@water.sannet.ne.jp.

Faka kaj scienca agado: S-ro José
Antonio Vergara, Casilla 508, Puerto
Montt, Ĉilio; ☎ +56 65 256660 [h],
+56 65 344606 [of], ✉ +56 994521017;
✉ joseantonio.vergara@gmail.com.

Observanto de TEJO:

S-ro Gregor Hinker.

Observanto de ILEI:

S-ro Stefan MacGill.

Vieno: Mil lernantoj intimiĝas kun Esperanto

Ekde la aŭtuno 2009 la Aŭstria Nacia Biblioteko en kunlaboro kun la Instituto por Junulara Literaturo organizas specialan programon en la Esperantomuzeo en Vieno: gvidadon tra la muzeo kaj Esperantan fulmkurson. La celgrupo: lernantoj el bazlernejoj. Dek tiaj kursoj jam okazis en 2009 kaj la rezulto estas sensacia, tiel ke oni jam plilongigis la oferton de tiu programo ĝis somero 2010. Oni kalkulas, ke la aranĝo finfine atingos entute 1000 lernantojn.

Kaj instruistoj kaj lernantoj estas plene kontentaj. "La infanoj multe lernas," certigas Herbert Mayer, la direktoro de la Esperantomuzeo. "Unue, la tuto estas tre fajne ellaborita, por ke ĝi taŭgu por la koncerna aĝo. Due, la temoj kaj kapabloj tuŝitaj dum la gvidado kaj la kursoj estas esence gravaj: Ekz. la lingvoproblemo, kiun ja

ankaŭ la lernantoj spertas pro la multetneco, kiu regas en Vienaj lernejoj. Kaj dum la fulmkursoj ili lernas dedukti el konkretaj situacioj la enhavon de fremdlingvaj frazoj, t.e. kapablon, kiun ili bezonas dum sia tuta vivo. La fakto, ke la aplikata lingvo estas Esperanto, estas de duaranga graveco, sed ege bona por nia afero."

La Aŭstria Nacia Biblioteko (ANB), kies parto estas la Esperantomuzeo, daŭre en tre kompetenta maniero varbas por la Esperantomuzeo, tiel ke verŝajne ne ekzistas alia lando, en kiu oni tiom ofte renkontas la vorton "Esperanto" en la amas-komunikiloj. La gazetara dokumentado de ANB atestas la tre impresan rezulton de tiuj klopodoj.

J. Schallock

Foto: © ONB





Kongresa komuniko 2

95-a Universala Kongreso de Esperanto Havano, Kubo, 17 – 24 julio 2010

Konstanta adreso: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Tel.: +31 (0)10 436 1044; fakso: +31 (0)10 436 1751.
Retadreso: kongresoj@co.uea.org.
TTT: http://www.uea.org/kongresoj/uk_2010.html.

Kongresa temo: La temo de la 95-a UK, *Interproksimigo de kulturoj*, ligiĝas al la samtema Internacia Jaro proklamita de UN kaj Unesko. Ĉi-numero, sur la apuda paĝo, aperas enkonduka artikolo de prof. Duncan Charters, kiu instigas diskuti pri la kongresa temo en ĉi tiu revuo, retlistoj kaj kluboj jam antaŭ la UK.

Kleriga Tago: En lundo, la 19-a de julio, estos la oka Kleriga Tago. Proponoj pri partoprenigaj programeroj, podiaj diskutoj, laborgrupoj kiuj rilatas ekz. al la movado, lingvoj, informado, organizado, aŭ prelegoj pri nekutimaj temoj estas bonvenaj ĉe Claude Nourmont (2 om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, Luksemburgo; rete: moonmont@pt.lu).

Esperantologia Konferenco: La 33-a Esperantologia Konferenco de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) traktos aktualajn problemojn de la esperantologio: lingvosciencaj, historiaj, literatursciencaj, psikologiaj, sociologiaj kaj politikaj aspektoj de Esperanto estos konsiderataj. Fakuloj, kiuj deziras kontribui, bv. kontakti Christer Kiselman (Poŝtkesto 480, SE-751 06 Uppsala, Svedio; rete: kiselman@math.uu.se) antaŭ la 18-a de aprilo.

Dua Bulteno: La Dua Bulteno estis dissendita al la aliĝintoj la 16-an de februaro. Kun ĝi estis sendita ankaŭ konfirmilo pri la aliĝo al la UK kaj kongresa mendilo. La Dua Bulteno estas legebla ankaŭ en la kongresa retejo http://uea.org/kongresoj/uk_2010.html. Mendojn oni povas fari per la papera mendilo aŭ rete ĉe http://uea.org/kongresoj/uk_mendilo.html. Por uzi la retan mendilon necesas indiki siajn kongresnumeron, UEA-kodon kaj retadreson. Oni atentu, ke la limdato, ĝis kiam la mendoj atingu la Centran Oficejon, estas la 1-a de majo.

Vojaĝado: La oficialaj flugkompanioj de la 95-a UK, Cubana de Aviación kaj Copa Airlines, ofertas favorprezajn flugojn. Cubana de Aviación flugas al Havano el 5 urboj en Eŭropo kaj 13 urboj en Ameriko. Copa Airlines flugas el diversaj urboj en Centra kaj Suda Ameriko kaj la Kariba regiono. Vd. pli detale en la januara numero aŭ www.uea.org/pdf/flugreklamilo_havano.pdf.

Loĝado: Detalaj informoj troviĝas en la Dua Bulteno, kiu proponas loĝadon en dek diversaj hoteloj. Depende de la nivelo de la hoteloj, la prezoj en unupersonaj ĉambroj varias de 34 ĝis 98 EUR kaj en dultaj ĉambroj de 26 ĝis 73 EUR.

Ekskursoj: La Dua Bulteno proponas du antaŭkongresajn ekskursojn (unu en Gvatemalo por ekkoni la majaan kulturon) kaj tri postkongresajn ekskursojn. Krome eblas elekti inter kvar tuttagaj kaj kvar duontagaj ekskursoj.

Infana Kongreseto: Internacia Infana Kongreseto okazos, se oni atingos minimumon da partoprenantoj, kio jam ŝajnas certigita. Pli da informoj donas la komisiito Bert Schumann, bert.schumann@free.fr.

IJK: La 66-a Internacia Junulara Kongreso (24-31 julio) okazos en la feriejo Los Cocos, Santa Cruz del Norte. Kotiztabelo k.a. informoj troviĝas en <http://www.tejo.org/ijk/2010/>.

ILEI-konferenco: La 43-a ILEI-konferenco (11-17 julio) okazos en la hotelo Caimao en Matanzas. Aliĝilo k.a. informoj: <http://www.ilei.info/agado/Kubo.php>.

Reklamiloj: La Unua Bulteno riceveblas ĉe la Centra Oficejo. Glumarka folio kun 12 markoj mendeblas ĉe la Libroservo de UEA por € 1,20 (rabato de 1/3 ekde 3 ekz.; aldoniĝas la sendokostoj kaj, en EU, imposto 19%). En la reta kinejo de UEA, www.ipernity.com/home/97850, videblas 10-minuta filmo pri Kubo, Havano kaj la kongresejo.

Aliĝilo: Aliĝilo estas ricevebla ĉe la perantoj kaj ĉe la Centra Oficejo, kiu volonte liveros ĝin grandkvante por distribuado kun E-gazetoj kaj en E-aranĝoj. Eblas ankaŭ elŝuti ĝin en PDF-formato ĉe la kongresa TTT-ejo, kie eblas ankaŭ rete aliĝi al la UK.

Kotizoj: Ĝis la 31-a de marto validas jenaj kotizoj (interkrampe tiuj por la landoj de tarifo B): Individuaj Membroj de UEA (sed ne MG) € 200,00 (150,00); MG-membro aŭ ne-IM de UEA € 250,00 (185,00); Komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, IM de UEA, € 100,00 (75,00); Kunulo/junulo/handikapulo, ne-IM de UEA, € 150,00 (110,00). Por Latina Ameriko: IM-UEA (ne MG) € 100,00; MG aŭ ne-IM de UEA € 125; Komitatano, kunulo... IM de UEA € 50,00; Kunulo / junulo... ne-IM de UEA € 75,00. Infanoj kaj junuloj naskiĝintaj post la 31-a de decembro 1989 aliĝas senpage (bv. sendi kopion de dokumento). Pri pagmanieroj vd. Jarlibron 2009 (p.38-39) aŭ www.uea.org/kongresoj/uk_pagmanieroj.html.

Statistiko: Ĝis la 19-a de februaro estis registritaj 599 kongresanoj el 51 landoj. En la nombro mankas ankoraŭ la kubanoj aliĝintaj ĉe LKK. Sur la unua loko estis Francio kun 97 aliĝoj. Japanio (55) kaj Germanio (52) rivalis pri la dua loko. Sekvis Brazilo (46), Italio (29), Nederlando (26), Pollando (18), Belgio (17), Britio (16), kaj Danio, Kroatio kaj Litovio (po 15).

Kongresa temo: Interproksimigo de kulturoj

Pasintjare la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis 2010 la Internacia Jaro de Proksimigo de Kulturoj, kaj taskis al Unesko la rolon kunordigi agadon tiucele.

Kion signifas "proksimigo" aŭ "interproksimigo"? Ĉu estas dezirinde ke la diversaj mondkulturoj forigu siajn diferencojn por povi "pliproksimiĝi" ĉiu al la aliaj? Ĉu "tutmondiĝo" signifas partan aŭ plenan kunfandiĝon de kulturoj kiel naturan, dezirindan evoluon de la homaro, subtenindan de ĉiu raciulo? Aŭ ĉu ni atentu pri danĝera tendenco al "tutmondigo" kun nuligo de diferencoj respegulantaj nian individuecon? Ĉu ni ne permesu ke ĉiu popolo sendepende evoluigu vivkriteriojn kiuj baziĝas sur siaj historio, socio, mondkonceptoj kaj sento de identeco? Aŭ ĉu la konceptoj "nacio" kaj "popolo" jam eksmodiĝis? Ĉu unu etna aŭ nacia kulturo rajtas perforte aŭ ŝtele trudi kaj akceptigi sin kiel novan regionan aŭ mondan superkulturon, minacante subigi aŭ eĉ nuligi en sia influfero jarcentajn aŭ jarmilajn kulturajn tradiciojn? Ĉu devos cedi al tutmondiĝo lingva kaj kultura diverseco, aŭ ĉu kontraŭe ni akceptu ke povos pliriĉigi nian estontecon kompreno kaj akcepto de tiu universala fenomeno de la homa historio, kun rezisto al senpensa kultura asimiliĝo?

Ofte en la historio de la homaro estis periodoj dum kiuj kunvivis, kunekzistis kulturoj diversaj rilate originon, religion kaj morojn. Tamen laŭ historiaj kaj sociologiaj studoj, ofte venkis unu superreganta kulturo sukcesinte sorbi la aliajn, forigante multajn el iliaj apartaĵoj sen signifaj modifoj siaflanke. Se tion duonkaŝe rezultigos "proksimigo" de kulturoj, neeviteble naskiĝos protestoj de la minacataj minoritatoj. Popoloj kaj individuoj eksentos sian malplivaloriĝon kaj iompost-ioman perdon de identeco, kio povas konduki al socia malstabiliĝo. Se aliflanke okazus senprotesta akcepto de tia asimiliĝo, fenomeno jam observata en la hodiaŭa mondo, la popolo povus ne konscii la perdon de unikaj kulturaj valoroj kaj la efikon de tiu perdo.

Ĉu instruado pri aliaj kulturoj kaj iliaj valoroj ĉiam rezultigas pli vastan komprenon, spiritan proksimiĝon? Certe ne ĉiam kaj ne aŭtomate. Kiam instruado okazas en la kunteksto de la deviga lernado de fremda lingvo, la lernantoj povas reagi kontraŭ tiu lingvo kaj kulturo kaj ĝiaj parolantoj, se ili sentas sin minacataj de la "fremdeco" kompare kun la propra, akceptita kulturo, kiu fariĝis por ili vivnormo. Nepozitiva sperto pri alia kulturo emas refortigi stereotipojn kaj antaŭjuĝojn, aparte se lernanto juĝas tion tempoperdo kompare kun pli agrablaj okupoj. Kiom ni atentis, en tipaj lingvoklasoj, konsciigi



lernantojn pri la valoroj kaj sintenoj kiujn ni havas komunaj kun reprezentantoj de aliaj kulturoj, kaj kiom ankaŭ tio helpus al vera interproksimigo de kulturoj?

Lernado pri alia etna lingvo kaj kulturo invitas komparojn, kaj instruistoj emas eĉ insisti pri tio sen plena konscio ke komparo de la "alia" kun la "propra" povas kontraŭefiki la efektivajn instrucelojn. Aparte se la instruisto entuziasmas pri la celita kulturo, povas rezulti la malo de malfermiteco, toleremo kaj akceptemo, se lernanto kredas siajn kulturon kaj vivelektojn atencatajn. En klasejoj "multkulturaj" laŭ konsisto aŭ lernoceloj, sukcesaj instruistoj scias ke necesas respektigi la tradiciajn kaj aktualajn kulturvalorojn de la lernantoj. Multaj trovis ke nur tiel ili povas konsciigi tiujn lernantojn ke aliaj kredaroj, moroj, kondutmanieroj havas sencon, se oni komprenas la tradiciojn kaj vivbezonojn de la alia popolo. Eble necesos ankaŭ malfermi pli larĝan perspektivon pri la diverseco de la kontribuantoj al la propra kulturo, antaŭ ol eduki pri socia toleremo kaj respekto en rilatoj kun alikulturanoj en kaj ekster la lando de la lernantoj.

Vera kaj profunda alproksimigo de kulturoj kutime ne okazas en klasejo, sed rezulte de efektivaj spertoj. En Principia College, kie mi laboras kun studentoj je universitata nivelo, kolemino eksperimente gvidis pasintdecembre programon en Gvatemalo. Ĝi celis intensivan lingvan kaj kulturan lernadon por studentoj plenumantaj la lingvolernajn postulojn de la Kolegio en triatrimestra klaso. Dum nur 3-4 semajnoj la kultura lernado estis tiel supera al la ebloj en la klasĉambro, ke ni ofertus la eblon al ĉiu studento, se tion permesus financa subteno. Kial? Pro la eblo fari profundajn ŝanĝojn en la interkultura kompreno kaj lernado, kiam ekzistas por tiu celo favoraj kondiĉoj. Ni starigu al ni la demandon, kiuj estas la elementoj kiuj favoras interproksimigon de kulturoj? Nu, por ekirigi la konversacion, ni vidu kelkajn, kaj komencu pensi kiel faciligi verajn lernoŝanĝojn en ĉiu aspekto.

1] Memkonscio kaj konsciĝo. Kiel eduki nin kaj niajn lernantojn por kompreni niajn kulture bazitajn supozojn kaj agojn, niajn interagojn kun aliaj, iliajn interagojn kun ni, kaj la neeviteblajn reagojn pensajn kaj konduktajn de tiu interagado?

2] Kulturaj sintenoj. Ĉu ni pretas informiĝi pri niaj propraj kulturaj sintenoj, kaj lerni de la praktikantoj de gastiganta kulturo pri iliaj? Kiel ni povas akcepti nian respondecon lerni



La artikolo "Poetoj detruas nian lingvon" de Anna Löwenstein en la pasintjara oktobra revuo kaŭzis lavangon da diversopiniaj reagoj. Jen daŭrigo al la decembra numero.

Ĉu troviĝas loko por danki al Anna?

Antaŭ kelkaj jaroj mi legis en la revuo *Esperanto* poemon premiitan en Belartaj konkursoj. Plu mi ne memoras la nomon de la poemo, kies enhavo restis por mi tute malklara. Troviĝis en ĝi nekonataj vortoj, kiuj mankis ankaŭ en mia vortaro. Pro tio mi sentis min stulta kaj hontis, eĉ ŝato al poezio malpliigis. Ŝajnis, ke poemoj estas nur por iu alta elito, ne por ordinara esperantisto por ĝui ĝin.

Kiam mi legis la artikolon de Anna Löwenstein "Poetoj detruas nian lingvon", mi volis danki ŝin. Tiu artikolo redonis al mi kredon al poezio, kaj ankaŭ al mi mem. Eble mi ja ne estas tiom stulta, kiom mi foje supozis. Krome, troviĝas ja multege da belaj poemoj komponitaj, kiujn mi kiel muzikamanto ŝatas kanti.

Anna-Liisa Ali-Simola, Finnlando

Facileco de la lingvo gravas

Ni, Japfi (laŭ nomigo de István Ertl) deziras, ke Esperanto estu ankaŭ por ni. Ju pli Esperanto proksimiĝas al la eŭropaj lingvoj, prenante por ni tute nekonatajn kaj sekve parkerendajn radikojn, des pli ĝuos la lingvo-elitulo de Esperanto sian superecon, dum simplaanimaj komencantoj, inspiritaj ke Esperanto estas facila lingvo, fortimiĝos antaŭ la komplika radik-enhavo de Esperanto kaj rezignos ĝin lerni plu. Aŭ eĉ se ili komencis lerni, ili konscios fortan submetiĝon antaŭ la lingvo, la saman kiam ili lernas la anglan, kaj fine ili abomenos ankaŭ Esperanton.

Kvankam multaj vortoj de Japfi havas aliajn nuancojn ol la ekzistantaj Esperantaj vortoj, tamen ni ne emas enkonduki niajn vortojn en Esperanton, ĉar tiam Esperanto fariĝos kurioza miksaĵo. Ĉu do la aziaj esperantistoj kreu Azian Esperanton

surbaze de la Zamenhofa Fundamento, enkondukante aziajn radikojn? Iu japana samideano proponas, ke la nomoj de la monatoj estu prefere unuato, duato, triato ktp, ĉar tio estas pli logika kaj ne arbitra. Tio aludas ke eĉ la nomoj de la monatoj estas parkerendaj por japanoj. Se kreiĝus Azia Esperanto, la eŭropaj kaj la aziaj esperantistoj interkomprenus preskaŭ senprobleme, malsame kiel japanlingvano kaj anglalingvano!

Mi opinias, ke plua evoluigo de Esperanto atendu ankoraŭ ĝis la plej multaj popolanoj de la mondo ekregos ĝin.

Nobuo Sakurai, Japanio

Pri poeziaj terminoj

Mi dufoje tralegis la artikolon "Poetoj detruas nian lingvon" de Anna Löwenstein. Mi treege konsentas kun ŝi kaj firme ŝin subtenas. Ĉi tie mi volus babili pri la poeziaj terminoj.

Iuj poetoj kreis vortojn por faciligi sian skribadon de poemoj. La vortoj estas ĝenerale neuzataj en konversacioj kaj rigardataj kiel poeziaj terminoj. La poetoj jam kreis nemal multe da ili, ekzemple: acerba, antro, argesto, aŭstera, bizara, degni, diskordo, dokta, dura, eksvoto, falva, farniento, febla, feroĉa, fragila, friska, hida, horto, ĥato, infamio, joviala, koŝmaro, kriĉi, langvoro, latrono, linda, medo, morna, moroza, nupto, opresi, paseo, poka, povra, prodigi, rimorso, ruro, sentinelo, sinistra, sombra, sordida, sproso, streta, ŝriki, tepida, turpa, tutelo kaj ceteraj, kies silaboj plejparte estas pli mallongaj ol la samsencaj ordinara Esperanto-vortoj, ekzemple: dura kaj malmola, hida kaj malbelega, sed iuj el ili silabe estas samlongaj, eĉ pli longaj ol la samsencaj ordinara Esperanto-vortoj. Ekzemple farniento kaj nenifaro, sinistra kaj maldekstra, joviala kaj gajema kaj aliaj. La lernantoj krom la samsencaj ordinara Esperanto-vortoj devas lerni kaj enmemorigi la poeziajn terminojn, alie ili ne povas

► kiel esti "bona gasto" en alia kulturo, kaj kompreni kaj ĝui la diferencojn kiujn ni konscie observas?

3] Kapabloj. Kiel ni lernu ŝanĝi nian konduton kiam ni interagis kun personoj de aliaj kulturoj? Kiel ni povas lerni komunikiĝi kun personoj de ĉiuj sociniveletoj, aĝoj kaj edukiteco en alia kulturo? Kiel ni lernu de aliaj kulturoj por konscie alpreni kutimojn kiuj plibonigos aŭ pliriĉigos nian interagadon en la propra kulturo?

4] Scioj kaj konoj. Kiel ni eduku nin pri kulturo kaj kulturoj ĝenerale? Ĉu mi kapablas kontentige difini la signifon de "kulturo" aŭ kulturoj? Edukiĝi pri pli formala, "humanisma" kulturo (geografio kaj naturo; socia strukturo; historio; religio, filozofio kaj kredaroj; monumentoj kaj gravaj lokoj; herooj; arto; literaturo) kaj neformala, "antropologia" ŝanĝiĝema ĉiutaga kulturo (parolaj kaj kondukataj formularoj, lingvouzado

kaj homa interagado; gestoj; tabuoj; vestaĵoj; laboro kaj amuziĝo inkluzive sportludado kaj feriado; manĝaĵoj kaj trinkaĵoj; registaroj/politikaj kaj edukaj sistemoj)?

Fine, kian rolon havas kaj havu Esperanto en la proksimigo de kulturoj? Objektive kaj senblage, kiom ni sukcesis ĝis nun? Ĉu ni bezonas seriozan edukadon, trejnadon, pli profundajn spertojn tiucele? Subjektive, kiel la uzo de la lingvo por interkomunikado ŝanĝis nian propran memkonscion, nian vivon, niajn sintenojn, kapablojn kaj sciojn? Ĉu la instruado kaj lernado de Esperanto havas apartajn avantaĝojn por la interproksimigo de kulturoj, avantaĝojn kiujn ni konsciigu al la mondo, se ni konsentas ke tio estas akceptebla kaj dezirinda celo?

Duncan Charters

Vicprezidanto de ILEI
duncan.charters@gmail.com

kompreni la poemojn. Se la poetoj estonte daŭrigos laŭvole kaj senĉese krei novajn poeziajn terminojn por faciligi al si la skribadon de la poemoj, ili sennecese pliigos la Esperanto-vortprovizon, kompleksigos kaj malfaciligos Esperanton, kio malfaciligos lernadon al la lernantoj, artefare plipezigos ilian ŝarĝon kaj malutilos al la posedo de Esperanto de la lernantoj kaj plivastigo de Esperanto en la tuta mondo.

La tempo antaŭenmarŝas. Novaj aferoj aperadas unuj post aliaj. Multege oni devas lerni kaj memori. Kiel la internacia helpa lingvo Esperanto devas eterne konservi unu el la avantaĝoj, simplecon-facilecon. La moderna ĉina lingvo, kiel ĉiuj scias, estas ege pli facila ol la antikva. La simpligo-faciligo de la lingvoj inkluzive de Esperanto kiel rimedo de komunikado inter la homoj devas esti la tendenco de la epoko, tendenco de la evoluigo de la socio. Ke la poetoj laŭplaĉe kreas la poeziajn terminojn estas kontraŭ tiu tendenco. La poetoj devas stari antaŭe de la tendenco, ĝin gvidi kaj uzi la normalan vortprovizon de Esperanto por verki belajn poemojn, en kio estas la poeta lerteco.

Ji Yin'geng, Ĉinio

Facila kaj samtempe riĉa

Kara Anna, mi tralegis vian libron *La ŝtona urbo*. Ĝi estas tre interesa. Dum la Aŭtora Duonhoru en Bjalistoko vi prelegetis post mi kaj mi sciis, ke vi verkis la libron, uzante nur fundamentajn vortojn. Aŭdinte tion mi aĉetis la libron. En *Esperanto* mi legis vian eseon pri la sama afero, kaj mi tute samopinias. Esperanto devas esti facila kaj samtempe ĝi devas esti riĉa.

Via verko montras ke tio estas ebla. Mi volas legi vian antaŭan verkon kaj atendas novan.

Hori Jasuo, Japanio

Ĉu neologismoj kaŝas mankon de talento?

Kara Anna, kun granda aprobo mi legis vian artikolon "Poetoj detruas nian lingvon" en la revuo *Esperanto*. Mi tute samopinias. Ofte mi indignas pro tiaj fuŝaĵoj. Sed mi ĉiam pensis ke mia indigno naskiĝis el mia malliteratureco. Ĝis nun! Ĉar nun parolis profesiulino! Do mia indigno tamen estas prava. Kiel forigi tiujn cikatrojn? Mi proponas, ke recenzanto de tiaj verkoj ĉiam enmetu en la recenzon la frazeton, "ĉu la abundaj nenecesaj neologismoj devas kaŝi mankon de talento?" Verŝajne bona rimedo kontraŭ tiaj verkoj.

Kees Ruig, Nederlando

Kiaj vortoj estas simplaj?

Karaj! Kiel ekspoezo kiu iam atentis ciferojn en PIV, mi limigis min al PV... mi ĝojis vidi l' atakon de Anna.

Sed... se kunulino diris 'trista' kaj 'povra' sen elitemo – la vortoj vole-nevole eniris mian propran parolon... Vivanta lingvo estas komuna afero, ne kabineta!

Kaj ĉinaj tradukistoj multe uzas vortojn el (kiel mi iam pensis) "poezia blagvortaro": komparu miajn kaj ĉinajn versiojn de *Du Fu*!

Kaj... iam embarasis min ke eminentulo improvizas ekvivalenton por 'handikapitoj', vorto jam vaste uzata en SAT: "aha do, li ĝis nun ne priparolis tiajn temojn!"

Ĉu obsedo pri subtila vortfarado, trovi, kio plaĉas en esence privata ludo per vortoj (ne vortludo, ĉar tio sugestus ion pli unuvortan, kalemburan!) foje forgesigas pri devo KRII proteste?

Adalberto Huleš verkis sub la titolo *Baza Kurso* per plej fundamentaj kombinoj: "...nuancoj de l' psiko moderna / kaj dume frapas blinda martelado. / Nur simplaj vortoj malvestas la brutan / realon: murdo... / mensogoj, struta stult'... / - vortoj ĝenantaj la delikatemon. / Por ver' la lingvo ja sufiĉe riĉas: / la plio estas nur parfumŝprucado!"

Sed li donis germanan titolon, "Dichtung und Wahrheit" – alude al Goethe, jes, "Poezio kaj Vero" ne efikus tiel... sed, konante nur la Goethe-titolon, mi ne scias, kia aludo!

Nu, kiaj vortoj estas simplaj?

Kris Long, Britio

Literatura lingvo kaj vortprovizo

"Poetoj detruas nian lingvon", asertas s-ino Anna Löwenstein en sia artikolo. La opinio estas trafa, kaj la verkistino tre bone prezentas ĝin.

S-ino Löwenstein kritikas literaturan vortprovizon. Se temas pri nur poezio, mi ne sentus la bezonon verki ĉi tiun artikolon. Sed dum la lastaj dudek jaroj tiuj literaturaj vortoj ĉiam pli emas migri en la normalan lingvouzon; tial en ordinara babilado oni nuntempe ofte aŭdas la vortojn "kurta, povra, uvo" ktp.

La verkistino timas, ke nia vortprovizo fariĝos same ampleksa kiel tiu de la angla. Mi komprenas la zorgon. Nature ĉiu lingvo bezonas novajn vortojn. Sen neologismoj eble povas esti malfacile esprimi ekz. tute novajn ekonomiajn kaj sociajn nociojn.

Teknikaj kaj sciencaj fakaj esprimoj apartenas al "alia mondo". Teknologio kaj diversaj teknikaĵoj antaŭen iras tiel rapide, ke neniuj perfekte kapablas postkuri. Sed en tiu ĉi okazo ni preskaŭ tute forgesu fakesprimojn, ĉar ili ne normale apartenas al ĉiutaga parolado, poezio aŭ literaturo.

Estas bona demando, ĉu ni vere bezonas "literaturan lingvon"? Kial ni ne simple uzu tiel nomatan "normalan" lingvon, kiu donas sufiĉe da ebloj por verkado? Alternativaj vortoj kaj esprimoj certe troviĝas. Ni ankaŭ memoru, ke Esperanto estas internacia lingvo. Kio ŝajnas esti taŭga por unu, eble ne estas taŭga por alia. Kompreneble ni estas pli-malpli ligitaj al nia gepatra lingvo. Sed tio ne povas signifi, ke ni trudus al Esperanto vortojn kaj esprimojn, kiuj estas konataj nur al ni, kiuj plaĉas al ni.

S-ino Löwenstein iom ironie demandas, kion faros literaturistoj, "kies vortelekto perdis sian elitan karakteron kaj fariĝas tiu de la ĉiutaga parolado? Ĉu ili kreas novan vortostokon por plumontri sian superecon al la ordinara parolantoj?" Mi samopinias kun s-ino Löwenstein ankaŭ pri tio, ke "bona literaturo konsistas precipe el la enhavo".

Mi ne estas poeto aŭ verkisto, sed mi plezure legas beletrajn librojn. Eble pro tio ankaŭ al mia aktiva vortprovizo apartenas kelkaj "literaturaj vortoj". Ekzemplo estu firmamento (ĉiela volbo).

Espereble la artikolo de Löwenstein okazigos aktivajn kaj fruktodonajn opiniojn pri la koncerna temo sen tro arda emocio.

Erkki Röntynen, Finnlando

Gvidlibro de la amikeco



Foto: La aŭtoro

De la 22-a ĝis la 29-a de novembro 2009 okazis la unua laborrenkontiĝo kadre de la projekto "Gvidlibro de la amikeco" en la urbo Polski Trambeŝ, Bulgario. La gastoj en la lernejo "Canko Cerkovski" estis lernantoj kaj instruistoj el Francio, Pollando kaj Hungario. La lingvo de ilia interkomunikado estis Esperanto. Pere de ĝi la junaj homoj de ĉiuj partneraj landoj kaj iliaj gvidantoj trapasis la lingvajn barojn, kiuj ofte ekzistas inter la partoprenantoj en similaj okazaĵoj.

Bazaj temoj kaj problemoj de la partnereco estas: edukado por la eŭropaj landoj kaj plialtigo de la lernejaj atingoj, kiuj estas necesaj en la ŝanĝiĝanta Eŭropo. La temo de la unua laborrenkontiĝo, okazigita en la lernejo "Canko Cerkovski" estis "Multvizaĝa Eŭropo".

Ĉiu lernejo ellaboris multrimedan prezentadon pri la temo "La lando de miaj geamikoj". La bulgara lernejo prezentis Francion, la franca prezentis Pollandon, la pola Hungarion, kaj la hungara Bulgaron. La prezentadojn oni montris al ĉiuj partoprenantoj de la projekto kaj al instruistoj kaj lernantoj, kiuj kun granda intereso partoprenis en la laboradoj.

Ĉiu partnero havis ankaŭ la eblon prezenti sian propran landon. Dum la gastigataj instruistoj renkontiĝis kun la instruistaro de la lernejo "Canko Cerkovski", la lernantoj ellaboris afiŝojn kun informoj pri siaj lernejoj, urboj kaj landoj. Poste la afiŝoj estis metitaj sur videblan lokon en la lernejo. Vespere la partoprenantaj lernejoj prezentis sian landon kantante kaj dancante – vestitaj en siaj popolaj kostumoj. Inter la lernantoj de la kvar partneraj lernejoj okazis komputila matematika konkurado, konkuradoj pri futbalo, basketbalo kaj teniso. La gastoj havis la eblon viziti lecionojn

pri muziko kaj sporto. Ili povis konstati ke inter la lernantoj kaj la instruistoj ne estas diversecoj, des pli ke oni havas komunan pontolingvon, Esperanton.

Okazis vizito al la sidejo de la folkloro grupo "Poljanci", kie la gastoj kaptis la okazon lerni kelkajn bulgarajn popoldancojn. Vespere oni ĝuis prezenton de la junaj popolaj kantistoj kaj dancistoj.

La partoprenantoj renkontiĝis kun la urbestro kaj membroj de la urba konsilantaro, kiuj ricevis multajn demandojn de la gastoj. Ankaŭ tiu ĉi renkontiĝo okazis en Esperanto kaj kiam necesis traduko, faris ĝin s-ino Mariana Genĉeva. Dum la renkontiĝo naskiĝis la ideo por peresperanta ĝemeliĝo inter Polski Trambeŝ kaj iu el la urboj-partneroj de la projekto. La gastoj havis la eblon viziti la urbojn Veliko Tarnovo, Pleven kaj Etara.

La venonta laborrenkontiĝo okazos en majo 2010 en la urbo Lyon, Francio. La temo estos "Eŭropo – pasinteco, estanteco kaj estonteco". Estos daŭrigataj la amikaj kunligoj kiuj naskiĝis ĉi tie kaj certe ekos novaj. Por pli konata, pli bona kaj pli amikema Unuiĝinta Eŭropo!

Mariana Genĉeva, maries972@yahoo.com

Korekto: en la pasinta numero, p. 32 pri MIREGE, anstataŭ Maria Evlogieva devis esti Maria Genĉeva.

Einstein-liceanoj en la CO

La 11-an de februaro 16 lernantoj de la Roterdama Einstein-liceo kun sia instruistino vizitis la Centran Oficejon.

Post la prezentoj de oficisto Ralph Schmeits (dekstre en la foto) kaj TEJO-volontulo Aleks Baudry pri Esperanto, UEA kaj TEJO, ili konatiĝis kun la biblioteko kaj libroservo. Poste ilia tasko estis verki eseon pri tio, kion ili aŭdis en la CO kaj legis en la ricevitaĵ informiloj. La liceanoj havis t.n. staĝotagon, dum kiu ili vizitis internaciajn entreprenojn kaj organizaĵojn. La ideon pri UEA kiel celo de la staĝotago la instruistino ricevis memorante pri sia vizito al la budo de UEA en la Roterdama Dunya-festivalo en majo pasintjare.



Foto: T. Kaźmierski

Ivo Lapenna: kelkaj detaloj etaj sed signifaj

Ivo Lapenna ja imponis. Jam lia korpa aspekto estis bela, grandskala, digna. Sed lia intelekto, kaj lia plurfaka, plurlingva, plurlanda uzado de ĝi preskaŭ konsternis min.

Sed intelekto estis nur parto de lia vivo kaj ties valoro. Tre sukcesa kariere en unu lando, li oferis preskaŭ ĉion pro principoj: perdis hejmon, klerkulturan libron, salajron, prestiĝon; ekzilis sin kaj multe suferadis, ĝis li kreis novan karieron en Britio. Karierojn! Kiel universitata profesoro pri internacia juro; juristo aliloke, eĉ en Hago; kleriga specialista verkisto en, mi kredas, kvin lingvoj; pluse, li iel trovis tempon, talentojn kaj energion por esti elstara organizanto pri Esperanto, nia unika oratoro, venkinto iam en Unesko, evoluiginto de UEA...

Ĉio estis tiel grandskala. Mi ne estis la sola kiu, admirante, trovis lin iom timiga.

Sed pri tiu homo, kiu oratoris unike, brile, antaŭ miloj en Universalaj Kongresoj, mi rakontos pri tri aferoj tre malgrandskalaj, sed pri li, por mi, tre signifaj.

Ivo Lapenna, konstante superŝutita per profesiaj kaj idealismaj taskoj, iam vojaĝis el Londono al fora norda Hexham, por paroli, relative simple, instige, kuraĝige, al eble dek junulinoj, ne eĉ en universitato, nur en seminario, kaj inspiris, informis kaj amuzis. Tiel etan aferon li atentis kvazaŭ en mondkongreso. (Ho ve, unu studentino iris al sia profesio, inspirita, kaj loka grupo de tetasaj kvaronesperantistoj nuligis ŝian inspiron ...)

Kelkajn jarojn poste li por similaj servoj venis eĉ pli longdistance kaj malfacile al seminario en Ambleside – en la konata, bela "Laga Distrikto", sed Lapenna ne havis tempon por turismo – kaj li parolis same brile, inspire, ĉarme, al manpleno da studentinoj. Denove, li brilis, impresis, ekbruligis ... sed neniu vere forportis kandelon. Sed jen sekreta detaletto: li luncis en mia direktorina salono kun mi kaj la vicedirektoro; kun lia varma permeso, mi invitis ŝian fraton, psike difektitan per militaj travivaĵoj, por renkonti

la ekspartizanon... Kun Jim Lapenna estis bele takta kaj ĉarma. La fratino poste diris al mi, ke ja estis por la frato ia sunbrilo, ia nekutima ĝuo.

Kompreneble, vizitinte multajn mondkongresojn kaj malpli grandskalajn aranĝojn, mi havas multajn etajn memorojn ne nur pri la oratoro, sed pri detaloj de humuro, ĝentileco, afablo, helpo – eĉ pri pardono kiam mi malplaĉis! Sed al miaj Movadanaj gefratoj mi nun provos bildigi okazon verŝajne unikan: la Solenan Malfermon de la Studocentro.

Mia hejmo estis dum multaj jaroj jam negranda propra domo en Oksfordo. En la urbo estis signifa grupo. Kiam onklino testamentis al mi signifan sumon, mi, kun multaj deziroj diversaj, decidis modifi mian subtegmenton por krei ĉambron por serioza studado Esperanta. Tegmento iĝis plafono, aperis planko, fenestroj, elektro, bretoj... kaj jen vortaroj, gramatikoj, aparatoj ktp. Eĉ modera komforto. Distanco de Londono ne granda. Mi zorge klarigis, kiel malgrandskala estos la afero; ĉu eble, por nia klubo, Lapenna faros

miniaturan inaŭguron? Tuj, jes. Amiko veturigis lin.

Bildigu, ridetu ... respektu. Jen niaj klubanoj kiel bidoj sur fadeno, sur hejma ŝtuparo, en la vestiblo; Lapenna sur eta interŝtuparo, antaŭ streĉita kordo, kun tondilo en la mano. Nia unika oratoro parolis tute serioze pri la valoro de tia studejo, kaj pri Esperanto, inspira kiel dum jaroj. Fine, ia rideto, levo de tondilo, alkuro supren de mia kato. "Ha, li deziras helpi!" Lapenna kondukis ĉiujn en la Centron kaj ĉiuj rigardis ... poste, ĉiuj iris suben por festa manĝeto; Lapenna restis kuraĝiga kaj gracia, belege finludis sian strangan rolon ... sen truda trodigno, amikece ...

Eta ĉambro – granda homo!

Marjorie Boulton



UEA en Interreto:

Ĝenerala retejo: www.uea.org;

Libroservo: www.katalogo.uea.org (katalogo kaj reta butikoj);

Reta Jarlibro: www.reto.uea.org (i.a. kun la reta versio de tiu ĉi revuo);

YouTube: www.youtube.com/UEAviva (10-minutaj novaĵfilmetoj);

Ipernity: www.ipernity.com/home/97850, (i.a. Reta Kinejo kun pli ol 20 filmoj);


Facebook: paĝo de UEA (890 "ŝatantoj" meze de februaro);

VK.com: grupo de UEA (70 anoj meze de februaro);

www.esperanto.com: paĝoj de la 95-a UK kaj de la Malferma Tago de la CO.



Libroservo de UEA en 2009: Katalin Kováts duobla ĉampiono



Katalin Kováts konkeris en 2009 la unuan lokon en ambaŭ furorlistoj, kiujn publikigas UEA.

La ekzerclibro *Poŝamiko*, redaktita de ŝi kun B. Allée, ne havis rivalon en la listo, kiu registras ĉiujn vendojn (ĉu en unu ekzemplero al individuaj klientoj ĉu en kvantoj al libroservoj k.a.). La vendonombro de *Poŝamiko* estis preskaŭ duoblo de la klasika *Ĉu vi parolas tendare?*, kiu revenis en la liston dank' al mecenata aĉeto por afrikanoj. (Donacantoj de libroj por triamondanoj povas ricevi malavaran rabaton, se temas pri granda kvanto.) La venko de *Esperanto de nivelo al nivelo*, ekzercilo por ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro, ĉe unuekzempleraj vendoj elstarigas la sukcesan starton de tiuj ekzamenoj. Inter la vendoj entute ĝi estis la kvara, post la plu populara *Vojaĝo en Esperanto-lando*.

La Libroservo de UEA vendis sume por 113 298,47 eŭroj, t.e. 11 809,15 eŭrojn (9,4%) malpli ol en 2008 (125 107,62). Pesimisto povus antaŭsenti en tio malbonan estontecon por nia libromarkato, sed oni ne tro maltrankvilu. Fenomeno konata el membrostistikoj, "kongresa efiko", trafis la Libroservon: en 2008 dum la Roterdama UK la vendoj sumiĝis je 40 504 eŭroj, sed en Bjalistoko same multe da kongresanoj butikumis por nuraj 29 000 eŭroj (-11 504 eŭroj).

La rezulto en Bjalistoko havis du kialojn: la klientaro tie estis malpli aĉetpova, pro kio ĉiuj prezoj tie estis forte rabatitaj. Plian fojon UEA montris, kial la Libroservo nomiĝas ĝuste tiel anstataŭ -vendejo. Per la Libroservo UEA ja celas ankaŭ enspezi, sed se ĝi ekzistus unuavice por ĉasi profiton, kiel iuj movadaj politikistoj foje proponas, la sekvoj estus katastrofaj por la Esperanta kulturo, unu el kies plej gravaj pilieroj ĝi estas. Dank' al la serva funkcio de la Libroservo la nombro de unuopaj libroj venditaj en Bjalistoko superis tiun en Roterdamo, eĉ se la mone mezurebla amplekso estis malpli granda kaj la neta profito apenaŭa.

Estas rimarkinde, ke la ĉefbutiko en la CO vendis al siaj poŝtaj kaj surlokaj klientoj praktike tiom kiom en 2008 (minuso de nur 305 eŭroj), kvankam en 2009 aperis malpli da novaĵoj ol en 2008. Laŭ A. Korĵenkov (*La Ondo de Esperanto* 2010:2) surmerkatiĝis 158 novaj libroj, dum la antaŭan jaron ili nombris 201. Ne aperis la ĉiam furora adresaro de *Pasporta Servo* kaj UEA mem malmulte eldonis, ĉar ĝia eldona forto estis dediĉita al la prespretigo de la plej dika libro en ĝia historio, *La arto labori kune*. Ambaŭ aperis komence de 2010 kaj la efiko estis tuja: jam en februaro ili certigis por si altan lokon en la venontfoja furorlisto. Krome, meze de februaro la sumo de ĉiuj vendoj jam estis pli alta ol iam ajn ekde 1995 je la sama dato, kiam la Libroservo ekregistris siajn vendosumojn ĉiumonate. Ni esperu, ke la vendoj daŭros same viglaj tra la tuta jaro kaj kompensos la neeviteble malgrandan rezulton de la libroservo en la Havana UK.

Entute la Libroservo vendis 15 049 unuopajn librojn aŭ aliajn varojn (13 707 en 2008). La nombro de venditaj titoloj estis praktike sama: 2 560 anstataŭ 2 554 en 2008. Ĉar UEA stokas ĉ. 5 500 titolojn, iom pli ol duono do allogis neniun aĉetanton.

Ankaŭ la nombro de klientoj ne vere ŝanĝiĝis: 653 anstataŭ 662. La Libroservo plenumis 1 620 mendojn, tiel ke la klientoj faris meze 2,5 mendojn. En tiuj ciferoj la kongresa libroservo cetere aperas kiel unu kliento, kvankam en efektivo ja temis pri kelkcent homoj. Ankaŭ ĉiu landa libroservo, kiu pluvendas al siaj klientoj varojn aĉetitajn ĉe UEA, estas statistikata kiel unu kliento.

Osmo Buller

VENDOJ ENTUTE

ekz.	Titolo	Prezo (€)
392	<i>Poŝamiko</i> (B. Allée & K. Kováts)	5,10
213	<i>Ĉu vi parolas tendare?</i> (R. Corsetti, M. La Torre)*	4,80
179	<i>Vojaĝo en Esperanto-lando</i> (B. Kolker)*	18,00
167	<i>Esperanto de nivelo al nivelo</i> (Red. K. Kováts)	10,50
121	<i>Pocket Esperanto Dictionary</i> (A. McLinen)*	15,00
112	<i>Monumente pri Esperanto</i> (H. Röllinger)*	7,50
106	<i>Utila Estas Aliĝo</i> (U. Lins)*	15,00
100	<i>Vivo de Zamenhof</i> (E. Privat)*	9,00
91	<i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA*</i>	4,50
88	<i>Konciza klarigo pri la landnomoj en E-o</i> (A. Löwenstein)	0,90
78	<i>Internacia Kongresa Universitato 2009</i> (Red. J.A. Vergara)*	15,00
65	<i>Faktoj kaj fantazioj</i> (M. Boulton)*	13,80
63	<i>Saluton!</i> (A. Childs-Mee)*	10,80
62	<i>Naturaj vortordoj en Esperanto</i> (W. Jansen)*	4,50
61	<i>Elektitaj paroladoj kaj prelegoj</i> (I. Lapenna)*	9,90
61	<i>Konciza etimologia vortaro</i> (A. Cherpillod)*	21,60
61	<i>Ŝlosilo angla</i> (A Key to Esperanto)	0,60
58	<i>Homarano</i> (A. Korĵenkov)	27,00
58	<i>La Zamenhof-strato</i> (R. Dobrzyński)	18,00
53	<i>Malkovru Esperanton</i> (E@I)	1,50
53	<i>Komputeke</i> (Y. Nevelsteen)	6,00

VENDOJ UNUOPAJ

ekz.	Titolo	Prezo (€)
51	<i>Esperanto de nivelo al nivelo</i> (Red. K. Kováts)	10,50
39	<i>Utila Estas Aliĝo</i> (U. Lins)*	15,00
30	<i>Morto de artisto</i> (A. Löwenstein)	18,90
30	<i>Vojaĝo en Esperanto-lando</i> (B. Kolker)*	18,00
28	<i>Beletra Almanako 4</i> (Red. Camacho, Daŝgupto, Ertl)	9,90
27	<i>La Asocio</i> (Z. van Dijk)	22,80
25	<i>Homarano</i> (A. Korĵenkov)	27,00
25	<i>Plena ilustrita vortaro de Esperanto 2005</i>	90,00
23	<i>La origino de specioj</i> (K. Darvino)	22,80
23	<i>Pasporta Servo</i> , listo de gastigantoj*	15,00
22	<i>Beletra Almanako 6</i> (Red. Camacho, Daŝgupto, Ertl)	9,90
22	<i>Concise Encyclopedia of the Original Literature of E-o</i> (G. Sutton)	48,00
21	<i>Konciza klarigo pri la landnomoj en E-o</i> (A. Löwenstein)	0,90
21	<i>Plena manlibro de Esperanta gramatiko</i> (B. Wennergren)	27,90
20	<i>Esperanto estas...</i> (DVD)	4,50
20	<i>Naturaj vortordoj en Esperanto</i> (W. Jansen)*	4,50
19	<i>Esperanto Mini-Course</i>	1,50
18	<i>Beletra Almanako 5</i> (Red. Camacho, Daŝgupto, Ertl)	9,90
17	<i>Konciza etimologia vortaro</i> (A. Cherpillod)*	21,60
16	<i>La ŝtona urbo</i> (A. Löwenstein)	22,80
16	<i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA*</i>	4,50

* Eldonaĵoj de UEA/TEJO.

Malgraŭ kontrolo kaj komparo kun aliaj kalendaroj ne eblas garantii la fidindecon de ĉiuj informoj en la kalendaro, pri kiuj respondecas nur la organizantoj. La venonta kalendaro aperos en la julia-aŭgusta numero.

marĉo:

02-07: Bibliaj Tagoj en Münster-Givenbeck, Germanio. Bibliaj prelegoj de patro Willibald Kuhnigk OSB, preĝoj kaj kantoj el *Adoru*.
✉ Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, DE-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio.
✉ eichkorn.b@t-online.de.

06: Printempa Revido 2010 en Nienburg (Weser) en Germanio. Ĉefe temas pri personaj kontaktoj kaj revido post la longa vintro. ✉ EMAS Esperanto-Ligo de Malsupra Saksio, ✉ www.esperanto.de/niedersachsen, emas@esperanto.de.

31 mar – 06 apr: 34-a Internacia Junulara Festivalo en Ronĉenjo, Italio, en la provinco



de Trento, meze de la Alpoj. Krom mojosaj programoj kaj amikema etoso, estas antaŭviditaj belegaj ekskursoj tra la montaro kaj eĉ porinfana festivaletto! ✉ Itala Esperantista Junularo, Via Villorosi 38, IT-20143 Milano, Italio. ✉ http://iej.esperanto.it/iej/, iej@esperanto.it.

aprilo:

01-05: PRINTEMPE en Dahlem-Baasem, regiono Eifel (Germanio). Venu ĝui la printempon! Pasigu kelkajn agrablajn paskajn tagojn en belaj domo kaj pejzaĝo! ✉ EsperantoLand e. V., Louis Ferd. v. Wunsch-Rolshoven, Wicelstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio. ☎ +49-30-685 58 31. ✉ +49-173-162 90 63. ✉ +49-30-68 05 70 11. ✉ http://esperantoland.org/printempe/, lu.esperantolandgmx.de.

02-05: 3-a Internacia Mezorianta Esperanto-Kunveno en Eskişehir, Turkio. ✉ Murat Ozdizdar, Dr. Rifat Paşa Sok 17/20, Göztepe Istanbul, Turkio. ✉ mozdizdar@uua.k12.tr, mezorianta-kunveno@yahoogroups.com.



02-05: KEKS en Hamburgo, Germanio. Kreiva Esperanto-kurso por junaj komencantoj, kun urbovizito, lingvokursoj en 2 niveloj, dolĉajmanĝegado kaj multe da amuzaj ludoj. ✉ Leo Sakaguchi, Am Kreuzberg 5, DE-63776 Mömbris, Germanio. ✉ www.esperanto.de/kej/kekso_e.html, jampegade@web.de.



02-09: Printempa Semajno Internacia en St. Andreasberg, Germanio. La paska aranĝo por la tuta familio, kun la 44-a Studsesio kaj UEA/KER-lingvoekzamenoj. ✉ Jörg Gersonde, ✉ psi@esperanto.de.

03-04: Verda Domo de Arizono, Usono. Printempa renkontiĝo, ideala por familioj. ✉ Angéline Taremi, ✉ angelinata@aol.com.



05-11: Lingva staĝo en Kvinpetalo. ✉ Kvinpetalo, FR-86410 Bouresse, Francio. ☎/✉: +33 5498074 ✉ www.kvinpetalo.org; informoj@kvinpetalo.org.

09-11: 4-a Sabla Printempo.

Komuna aranĝo de Ĉeĥa E-Asocio, Ĉeĥa E-Junularo kaj E@I en Pisek, Ĉeĥio. Trejnseminarioj kaj prelegoj pri diversaj temoj kadre de "Esperanto kaj Interreto". Solena inaŭguro de ekspozicio pri Esperanto en la urba biblioteko. ✉ pisek@esperanto.cz.



17: 32-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, Nederlando. Prelegoj (i.a. Mark Fettes), filmoj, libroprezentadoj k.a. En la libroservo ĉio rabatita. ✉ (v. la kolofono).

25-29: Printempa Krimeo en Ukrainio. Esperanta turista piedvojaĝo en la Krimea montaro. ✉ Roman Kozarenko, ✉ dr.rokozarenko@gmail.com, http://piedvojagxo.ukrainio.org.ua/.



27 apr – 01 maj: Kurso de Esperanto laŭ matematika vidpunkto en kastelo Greziljono en Baugé, Francio. Analizo kaj instruado de Esperanto laŭ maniero pli adekvata al homoj matematikemaj aŭ logikemaj. Debato pri diversaj temoj rilataj al Esperanto, al matematiko aŭ preferinde

al iliaj komunaj karakteroj, pensmanieroj. ✉ Kulturdomo de Esperanto, Château de Grésillon, FR-49150 Baugé, Francio. ✉ http://gresillon.org/spip.php?rubrique2&lang=eo, kastelo@gresillon.org.

Aroma Jalto

29 apr – 09 maj: 22-a Aroma Jalto en Jalto, Ukrainio. E-festivalo kies celo estas plialtigi la lingvonivelon de la partoprenantoj kaj konatigi ilin kun la belega naturo de Krimeo. ✉ Volodimir Hordijenko, p/k 35, UA-01133 Kiev, Ukrainio. ☎/✉: +3 (044) 2851701. ✉ http://aromajalto.ukrainio.org.ua/; volodimir@ukr.net.

majo:

01-02: 45-a Studsesio por klerigado ĉe ICH Herzberg, Germanio: GEJ-Klerigseminario pri varbado kaj kursorganizado. ✉ Peter Zilvar, Grubenhagenstr. 6/8, DE-37412, Herzberg, Germanio. ✉ esperanto-zentrum@web.de.

06-12: Printempa BARo 2010 (inkluzive Ĉielen-iron) en Bad Münder inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. ✉ Andi Münchow, Oberstraße 15, DE-30167 Hannover, Germanio. ✉ www.krokodilo.de/baro/baro.php, andim@gmx.li.



08-15: 62-a kongreso de IFEF, Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, en Sofio, Bulgario. ✉ Organiza Komitato, ul. Ivan Vazov 3, BG-1080 Sofia, Bulgario. ☎ +359-88-090163, +359-889-362523; ✉ (+3592) 9877151. ✉ http://ifef.net, http://ifef.free.fr/spip/, veskam@abv.bg, petia_aleks@abv.bg kaj renag@mail.bg.

13-16: Beneluksa Kongreso en Antverpeno, Belgio. Internacia kongreso kun la temo "lingva diverseco en Benelukso" kun danckoncerto de Kapriol'. ✉ Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio. ✉ www.esperanto.be/kongreso/, sekretario@fel.esperanto.be.



14-16: Sveda jarkongreso en Lesjöfors, Svedio, en la Esperanto-Domo en Lesjöfors. Eblas alveni pli frue por tutaga ekskurso. Prelegoj, teatroprezento, jarkunvenoj. ✉ Sveda Esperanto-Federacio, Ulla Luin (adm.), Myggdalsv. 123, SE-135 42 Tyresö, Svedio. www.esperanto.se, sefkongr2010@esperanto.se.



14-17: 91-a Brita Esperanto-Kongreso en Llandudno, hotelo Imperial, Norda Kimrio. ✉ Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio. ☎ 0845 230 1887, +44 (0)1782 372141. www.esperantollandudno2010.org.uk/, eab@esperanto-gb.org.

13-16: Staĝo en Kvintepalo. Vigligo de regiona E-agado. ✉ (v. 05 apr.).

20-22: 11-a Komuna Israela Esperanto-Semajnfino (KIES) en la nordisraela urbo Kacrin. ✉ Nava navatb@walla.com aŭ Amri amri@huji.ac.il.

21-24: Komuna franca kaj germana Esperanto-kongreso en Kaiserslautern, Germanio. 87-a Germana E-Kongreso kune kun la franca nacia E-kongreso. Per la komuna aranĝo francaj kaj germanaj esperantistoj demonstras, ke amikeco inter najbaroj en Eŭropo estas memkomprenebla en Esperantujo. ✉ Dirk-Werner Hartmann, Sprachschule Rahn, Karl-Marx-Str. 37, DE-67655 Kaiserslautern, Germanio. www.esperanto-kl.de.ms, gek2010@esperanto.de.

22: 46-a Studsesio por klerigado ĉe ICH Herzberg, Germanio: Klerigmoduloj: gramatiko, literaturo, kulturo, metodiko. ✉ (v. 01 maj).

22-24: 7-a MEKARO – Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto ĉe Tririveroj, Kebekio, Kanado. Turisma amikeca semajnfino. Okazas vizitoj kaj komunaj manĝoj en restoracioj. ✉ Esperanto-Societo Kebekia, 6358 de Bordeaux, Montréal, Québec, Kanado, H2G 2R8; www.esperanto.qc.ca/en; informo@esperanto.qc.ca.

27-31: Rusia Esperanto-Kongreso, REK-26 en Peterburg, Rusio. Internacia E-renkontiĝo kun guado de la belega urbo, de ĝiaj muzeoj, teatroj, katedraloj; ŝipaj promenoj sur kanaloj kaj sur la rivero Neva... Venu frandi la rusan kulturon kaj trovi amikojn inter rusiaj esperantistoj! ✉ www.reu.ru/index.php?evento=REK-26; kongreso@reu.ru kaj ĉe Anna Butkevič: annaespero@mail.ru.



28-30: 100 jaroj de Esperanta movado en Bjalistoka, Pollando. Konkursoj, koncertoj, teatraĵoj, urba strata ludo, 1-taga vojaĝo per speciale luita trajno al Belorusio/Grodno: trarigardo de la lastaj 100 Esperanto-jaroj en la

lulilo de Esperanto. ✉ Bjalistoka E-Societo, str. Piękna 3, PL-15-269 Białystok. www.esperanto.bialystok.pl, esperanto.bialystok@interia.pl.

28-30: Boatado en Ignalina, Litovio. Ĝi okazos en la Nacia parko de Aŭkštaitija, Ignalina distrikto. ✉ olga.strojeva@gmail.com, aŭ jolanjo@gmail.com.



28-31: Usona Landa Kongreso en Washington, DC, Usono. Jara Landa Kongreso. ✉ Esperanto-USA, www.esperantodc.org, esperantodc@mail.com.

junio

01-05: Postkongreso en Rusio (post REK-26) en Moskvo. Vi ĝuos antikvan kaj modernan Rusion, vizitos muzeojn, teatrojn, belegajn apudmoskvajn bienojn, renkontiĝos kun rusiaj esperantistoj. Rusio de interne vere estas alloga! ✉ Svetlana Smetanina, ul. Budajskaja 13-35, RU-129128 Moskva, Rusio. svsmetanina@yandex.ru.

04-06: 20-a Esperantista Krea Renkontiĝo "ABRITUS" en Razgrad, Bulgario. Anoncotaj rezultoj de Esperanta literatura konkurso kaj humuraĵoj. Ekskursoj, festado, dancoj kaj kantoj. Verkojn oni sendu al ✉ "D-ro Iv. Kirchev", ul. Sveti Kliment 36, ap 1, BG-7200 Razgrad, Bulgario. ☎ 359896 384 789. esperanto_razgrad@mail.bg.



04-07: 105-a Skota kaj Internacia Kongreso de Esperanto en Berwick-upon-Tweed, Skotlando/Anglio. Festu kun la skota movado la 105-an kongreson (jes, tio ne estas preseraro) en la bela apudmara urbeto Berwick-upon-Tweed sur la skota-angla landlimo. ✉ Ed Robertson, 52 Easter Drylaw View, Edinburgh, EH4 2QP, Skotlando. ☎ +44 (0)131 332 9803. www.skotlando.org, ed-robertson@teleosvet.co.uk.

04-08: 24-a Kongreso de Italia Katolika Unuiĝo Esperantista en Borgo Tossignano, Italio. ✉ Giovanni Daminelli, www.ueci.it/kongresoj/kng_2010/kng_2010.htm, katolika.sento@ueci.it.

05-19: Esperanto-Karavano per la Trans-Siberia Trajno tra Rusio, komuna vojaĝado en la ekzotika trajno-linio survoje al la 6-a Azia Esperanto-Kongreso en Mongolio. ✉ Tatjana Loskutova, ul. Gen. Hlebnikova 48-71, RU-153048 Ivanovo, Rusio. http://mongolio.info/?page_id=539, www.ipernity.com/blog/32119/198290, lota49@mail.ru. Vidu ilustran filmeton: www.youtube.com/watch?v=j4WivLm4SIU.

15-23: 32-a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno apud Koszalin, Pollando. Riĉa kaj

varia E-programo. ✉ Czesław Baranowski, Esperanto, PL-75-017 Koszalin, Pollando. ☎ +48 (0) 503-417-825. www.esperanto.koszalin.pl, barslavo@wp.pl.


19-21: Verda Domo de Arizona. Internacia Montara Tendumo proksime al la Granda Kanjono. Dume okazos Indiĝena Indiana festivalo. ✉ (v. 03 apr.).

19-23: La 6-a Azia Esperanto-Kongreso en Ulanbatoro, Mongolio. ✉ Komisiono de UEA pri Azia Movado, Lee Jung-kee, <http://mongolio.info>, esperanto@saluton.net.



20: Tradicia renkontiĝo de ĉeĥaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj sur la pinto de la monto Ĉantorio. ✉ suchanekj@seznam.cz.

24-27: Internaciaj lingvaj kaj turismaj tagoj en Studený, Ĉeĥio. Lingva trejnado, prelegoj, ekskursoj busaj kaj piedaj, amuzaj vesperoj. ✉ E-Asocio – Saksa Svisujo, nokosaksio@gmail.com.



25-27: Jubilea Kunveno de politikaj diskutoj kaj EDE en Alsóörs, Hungario. 10-jariĝas la politikaj diskutoj pri lingvaj rajtoj, kiuj preparis la terenon por EDE. Samtempe okazos la 3-a internacia federacia konferenco de politikaj asocioj kaj partioj, Eŭropo-Demokratio-Esperanto. ✉ Eugen Macko, www.e-d-e.org/Politika-diskuto-cxe-Balatono-en, eumacko@aol.com.



26 jun - 04 jul: 46-a Baltiaj Esperanto-Tagoj, BET-46. Sub aŭspicioj de UEA. Tradicia ĉiujara somera internacia aranĝo de baltiaj esperantistoj, okazanta ekde 1959 laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio. ✉ Litova E-Asocio, p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio. ☎ +370-37-228616. www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET46, litova.ea@mail.lt.

27 jun - 02 jul: Esperanto-kurso en ĉiuj niveloj en Heinävesi, Finnlando. La 11-an fojon en Popola Instituto de Valamo, Heinävesi. Ĉiuj kursniveloj, kursanoj el la tuta mondo. Eblas ankaŭ vizito en la areo. Instruistoj Atilio Orellana Rojas, Patrik Austin kaj Tiina Oittinen. ✉ Tiina Oittinen, sekretario de EAF, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. www.esperanto.fi, eafsekretario@esperanto.fi.

27 jun - 03 jul: 63-a Kongreso de IKUE en Parizo, Francio. Antaŭ 100 jaroj por la unua fojo niaj pioniroj kongresis en Parizo por la starigo de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Tial ĉi-jare oni revenas al Parizo ne nur por omaĝi al niaj karaj pioniroj kaj inde soleni gravan datrevenon, trarigardi tiun jarcenton da esperantista katolikeco, por poste restarti per nova elano. ☐ Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, c/o Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio. ☐ www.ikue.org/kong2010/index.htm, parizo2010@gmail.com.

27 jun - 05 jul: Internacia E-Laborbrigado dum la **Roskilde-rokfestivalo** en Roskilde apud Kopenhago, Danio. Dank' al 3-taga laboro la restado estos senpaga. ☐ DEJO, ☐ <http://roskilde.festoklubo.dk>, blindulo@gmail.com.

julio

01-07: FREŜO - Frusomera Renkontiĝo de Esperantistoj Ŝatantaj Olŝtinion en Olsztyn (Olŝtino), Pollando. Tradicia E-arango kun riĉa ripozprogramo kaj premioj dum ĉiutagaj kvizoj. ☐ Elżbieta Frenszkowska, ul. Orłowicza 35 m 5, PL-10-684 Olsztyn, Pollando. ☐ www.esperantowolsztynie.pl, efrenszkowska@wp.pl.

01-10: Internacia Esperanto-Tagnoktoj, IET-2 en Tarhankut, Ukrainio. Unika anguleto de Krimeo ĉe la Nigra Maro. Senhomaj puregaj plaĝoj, diafana akvo, Esperanto-aleo en unika subakva muzeo, ideala loko por familioj kun infanoj, loĝado en komfortaj ĉambroj aŭ en tendoj, baseno en la bazejo. En la programo: ekskursoj, E-kursoj, koncertoj vesperaj kaj noktaj (ĉe lignofajro), spektakloj. ☐ Jefim Zajdman, ☐ jefim_z@mail.ru, <http://esperanto.net/iet2010>. ☎ +3-096-483-8585.

02-06: Hispana Kongreso de Esperanto en la bela kaj historia urbo Santiago de Compostela, fama pilgrimloko. ☐ Hispana Esperanto-Federacio. ☐ www.esperanto.es, lourenzokuin@hotmail.com.



02-10: SES 2010 - Somera Esperanto - Studado en Piešťany, Slovakio, kun 3-a renkontiĝo de lernu!-uzantoj. Antaŭtagmeze lernado, posttagmeze ekskursoj, vespere amuzado, seminario "Flugiloj de malfacila vento" kaj ekzameno de Komuna Eŭropa Referencokadro. ☐ Peter Baláz, Vítazná 840/67-A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio. ☐ http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/, esperanto666@gmail.com, ses@lernu.net.

10-24: Malkovru Ukrainion! Nekutima renkontiĝo en Ukrainio: sen kursoj, nur ekskursoj! MiaMU-1 estas la unua en la serio "Malkovru Ukrainion". Ĝi okazos en la ĉefurbo Kievo kaj en Jalto (suda bordo de Krimeo). ☐ Mikaelo Lineckij, ☐ www.lineckij.kiev.ua/miamu, oi-centro@ukr.net.

11-17: 43-a Konferenco de ILEI en la hotelo Canimao, Matanzas, Kubo. ☐ info@ilei.info; www.ilei.info/agado/Kubo.php.



17-23: Konferenco de OSIEK (IEK) en Herzberg, Germanio, organizata de E-Centro Herzberg, kun la temo "Kial Esperanto estas revolucia lingvo?" 47-a Studsesio: Klerigmoduloj: literaturo, kulturo, interlingvistiko, metodiko. ☐ Eric Laubacher, ☐ kasisto@osiek.org kaj esperanto-zentrum@web.de (v. ankaŭ 01 maj).



17-24: 95-a Universala Kongreso en Havano, Kubo. ☐ (v. la kolofono). ☐ www.uea.org/kongresoj/uk_2010.html.

17-24: 41-a Internacia Infana-junula Kongreseto en Havano, Kubo. Infanoj kaj junuloj amuziĝas en hotelo Acuario (en kvartalo Marina Hemingway, municipo Playa), je la okcidenta rando de Havano, dum iliaj gepatroj ĝuas la UK-on. Ni akceptas ĉiun aĝon; tre junaj infanoj venas kun akompananto; junuloj povas iĝi helpantoj. ☐ Bert Schumann, 9 rue Couradin, FR-35510 Cesson-Sevigné, Francio. ☐ <http://bertosch.free.fr/iik2010/>, bertox@free.fr.



17-24: Someraj kursoj (semajna staĝo) en kastelo Greziljono, Baugé, Francio. Diversnivelaĵ kursoj kaj kromaj aktivajoj. ☐ (v. 27 apr).

19-30: Teatro-staĝo laŭ la rusa metodo en Minsk, Belorusio. Dusemajna intensa trejnad kun multaj instruistoj kaj diversaj kursoj: improvizata teatro, scena esprimado, ritma dancado, parolprononco, kantado, bio-mekaniko. ☎ +33(0)1 42 813396. ☐ Morgaŭ la Printempo (Demain le Printemps), 14 rue de la Tour d'Auvergne FR-75009 Paris, Francio. ☐ www.tejo.org/ijk/2010, morgaulaprintempo.org, morgau.la.printempo@gmail.com.

24-31: 66-a IJK, Internacia Junulara Kongreso, en la alloga kampadejo Los Cocos, en Jibacoa, Santa Cruz del Norte, sur la norda marbordo de Kubo, 45 kilometrojn for de Havano, meze de la vojo de Havano al la banloko Varadero. Temo: Interkompreniĝo de popoloj.

☐ www.uea.org/kongresoj/uk_2010.html.

24-31: 5-a Somera Arbara Lernejo (SALO-5) en Herzberg, Germanio. ☐ (v. 01 maj).

24-31: Someraj kursoj (semajna staĝo) en kastelo Greziljono, Baugé, Francio. Diversnivelaĵ kursoj kaj kromaj aktivajoj. ☐ (v. 27 apr).

30 jul - 03 aŭg: MELA, MEMzorga LAg-umado en Délegyháza, Hungario. Vidu ankaŭ 9-16 aŭg. ☐ Antaŭ MELA ☎ +36-30-2097864, dum MELA +36-30-2752068 kaj +36-30-2097864. ☐ www.krokodilo.de/mela/mela.php.

31 jul - 07 aŭg: Someraj kursoj (semajna staĝo) en kastelo Greziljono, Baugé, Francio. Diversnivelaĵ kursoj kaj kromaj aktivajoj. ☐ (v. 27 apr).

aŭgusto

02-09: 60-a Kongreso de KELI en Beregdaróc, Hungario. Kristana kunveno. Matena kaj vespera preĝoj, preleĝoj pri diversaj temoj, ekskursoj. ☐ Ráczkevy Eötvös Ágnes, Pf. 5, HU-1400 Budapest, Hungario. ☐ www.chez.com/keli, keli.2010@yahoo.com.

02-11: Somera Seminario de ILEI-Ĉinio en Taiyuan. Seminario por E-instruistoj kaj instruistoj, kiuj matene prelegas kaj posttagmeze instruas, babilas, prezentas, ludas. Du ekskursoj duontagaj. La ĉefa celo estas lerni aliajn instruajn metodojn kaj paroli ĉinajn esperantistojn. Alilandanoj bonvenas. ☐ Prof. Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang-Universitato, CN-330031, Nanchang, Ĉinio. ☐ arko.gong@qq.com.

03-09: Internacia Junulara Semajno en Pécs, Hungario. Tradicia junulara arango. Ne forgesu kunporti vian akvopistolon! ☐ Hungara Esperanto-Junularo, Dévainé Gede Krisztina, ☐ www.ijs.hu, kiki.esperanto@gmail.com.



07-14: Someraj kursoj (semajna staĝo) en kastelo Greziljono, Baugé, Francio. Diversnivelaĵ kursoj kaj kromaj aktivajoj. ☐ (v. 27 apr).

08-11: 5-a Internacia Renkontiĝo de Meditado en Seulo, Koreio. Esperantista Asocio de Ŭonbulismo okazigas enhaviĉan renkontiĝon kun diversaj programoj ĉiutage, en kiu oni povas praktiki meditado, fari komunan ekskurson al vizitindaj lokoj, sperti la korean kulturon. ☐ Esperantista Asocio de Ŭonbulismo. ☐ www.uonbulismo.net, esperanto@saluton.net.

09-13: 50-a Somera Festivalo - Kunludu kaj kunstudu en Barlastono, Britio. Du-nivela kursaro kun la eblo turismi aŭ private studi, esplori en la Biblioteko Butler. Pro la jubileo okazos aparta festo meze de la semajno. ☐ Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio. ☎ +44-(0)1782-372141. ☐ eab@esperanto-gb.org.

09-16: MELA (MEMzorga LAg-umado) en Délegyháza, Hungario. (v. 30 jul).

10-17: Muzika staĝo en Kvinpetalo. Kantoj, ĥoroj, orkestra muziko, realigo de KD, kun Markov-familianoj. ✉ (v. 05 apr).

13-20: FESTO en Tuluzo, Francio. Esperanto-muziko: Jomo kaj Vinilkosmo. ✉ JEFO, <http://esperanto-jeunes.org/-Festo-2010?lang=eo>, <http://jefo.fr>, bjokac+eventoj@gmail.com.

14-22: Pluezekaj Renkontiĝoj Internaciaj en Plouézec, Francio. Kursoj de diversaj niveloj, turismo, ekskurso, atelieroj. ✉ Plouézec Esperanto, 5 hent toul broc'h, FR-22470 Plouézec, Francio. ✉ www.pluezek-esperanto.net, pluezek@gmail.com.

20-22: 6-a Nordorienta Ĉina Kongreso de Esperanto en Dandung, Ĉinio.

21-28: EKOTUR (Ekoturisma renkontiĝo por biciklantoj kaj piedturistoj) en la regiono de lagoj en la suda Ĉeĥio. ✉ KAVA-PECH, Petr Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice, Ĉeĥio. ☎ +420257712201. ✉ +420257712126. ✉ www.kava-pech.cz; chrdle@kava-pech.cz.



21-28: 77-a Itala Kongreso de Esperanto en Lignano Sabbiadoro (Linjano Orsabl), Italio. La ĉeftemo: *Lingvaj rajtoj en la Eŭropa multkultura socio*. La ĉiujara itala nacia kongreso okazas ĉe la marbordo. Ĉi-jare la itala organizita E-movado festas sian 100-jariĝon. ✉ Brunetto Casini, ✉ <http://italakongreso.esperantoitalia.it>, esperanto@edistudio.it.

21-28: 36-a Internacia Semajno de Esperanto en Sète apud Montpellier, Francio. Trinivelaj kursoj, 50 m de mediteranea plaĝo, ekskursoj, libroservo. ✉ Esperanto, Kulturo kaj Progreso, 10 passage J. Ferry, FR-34290 Servian, Francio. ☎/✉ +33(0)4673916 30. ✉ <http://pagesperso-orange.fr/nikolao/esperanto.html>, jf.passarella@free.fr.

27-29: 3-a Somera Universitato de Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE) en kastelo Greziljono en Baugé, Francio. La politika asocio EDE invitas simpatiantojn de EDE kaj iliajn familiojn. ✉ bert.schumann@gmail.com, www.e-d-e.org/Somera-Universitato-en-kastelo,303.

septembro

11: Literumiloj kaj Lingvohelpiloj. Kolokvo/ Ateliero en la domo de Andreo Cseh, Internacia Esperanto-Instituto en Hagio, Nederlando, gvidata de Marek Blahuš (Univ. Brno), Eckhard Bick (E@I-projekto Lingvohelpilo) kaj Toon Witkam (ESPSOF). ✉ www.iei.nl, cxej@blahus.cz.

12: 9-a Spiritisma Esperanta Renkontiĝo (SER) en Rio de Ĵanejro, Brazilo. "Esperanto: ilo de paco inter la popoloj". Prelego kaj artaj momentoj (muziko, teatraj skeĉoj, poemoj) de la 9-a atm ĝis la 1-a ptm. ✉ E.G. Lazaro

Luiz Zamenhof, Strato Abilio dos Santos 137 - Bento Ribeiro. ✉ www.lazaroluizamenhof.com, contato@lazaroluizamenhof.com.br.

17-19: Semajnfinaj E-kursoj en pluraj niveloj en Herzberg, Germanio. ✉ (v. 01 maj).

18-27: Internacia arta E-festivalo Velura sezono 15 en Jalto (Krimeo, Ukrainio), dum milda, t.n. velura sezono, kiam la suno ne plu bruligas, sed la maro ankoraŭ estas varma. Koncertoj: kantoj, dancoj, spektakloj. Ekskursoj al pitoreskaj kaj historiaj lokoj de Krimeo, turistaj marŝoj al montaro, renkontiĝo de E-komputistoj. ☎ +3-096-4838585, 38(0654)319085. ✉ Jefim Zajdman, ✉ www.jaltaespero.narod.ru, jefim_z@mail.ru.

19: 13-a ERT - Esperanta Renkontiĝo de Taguatinga (Braziljo, Brazilo). ✉ tek.esperanto@ig.com.br.

24-26: XXVI-aj ARTaj KONfrontoj en ESperanto 'ARKONES' en Poznań, Pollando. Sendependa kultura kaj arta esperantista aranĝo en Pollando. Unu el la plej grandskalaj manifestadoj de Esperanto-kulturo sub aŭspicioj de UEA kaj PEJ. ✉ Tobiasz Kaźmierski, ✉ tobiasz@esenco.org, www.arkones.org.

oktobro:

01-04: KoKoLoRES, Kafoklaĉo kaj Ludoj dum Renkontiĝo Semajnfina en Herne, Germanio. Se vi ŝatas ludi, babili, renkonti homojn, venu. Kunportu viajn plej ŝatajn ludojn kaj ni ludu kune. ✉ www.krokodilo.de/kokolores/kokolores.php, petra.dueckershoff@esperanto.de.

02-09: 18-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo en Coma-Ruga (El Vendrell), Taragona, Hispanio. Luis Serrano Pérez, ☎ 34937275021. ✉ luis_serrano@mixmail.com; <http://personales.ya.com/semajno>.

08-10: TORPEDO-6 / ILEI-Seminario pri projektoj kaj subvencipetado kaj **48-a Studsesio** kun KER-ekzamenoj en Herzberg, Germanio. ✉ (v. 01 maj).

09-11: 17-a Aŭtuna renkontiĝo de Esperanto en Sylver Bay, Lake George, NY, Usono. Amikeca semajnfino, kun kursoj, prelegoj, ludoj kaj multe pli sur belega loko ĉe lago. ✉ Esperanto-Societo Kebekia, 6358 de Bordeaux, Montréal, Québec, Kanado, H2G 2R8. ✉ informo@esperanto.qc.ca.

11: Grundtvig-Seminario 50+ en Herzberg, Germanio, kun partoprenantoj el Germanio, Pollando kaj Slovakio. ✉ (v. 01 maj).

11-17: InPaSem (Internacia Paroliga Semajno), por komencintoj kaj jamaj parolantoj en Dobřichovice apud Prago, Ĉeĥio. ✉ KAVA-PECH (v. 21 aŭg).

22-24: 'Course-You-Can', Barlastono, Britio. Kurso ĉefe por anglalingvaj komencintoj / komencintoj. Samtempe okazos 'Drondo', Semajnfina Esperantlingva diskutrondo pri diversaj temoj. Spertuloj kunvenigu nespertulojn! ✉ (v. 09 aŭg).

24-30: 5-a Kieva Esperanto-semajno en Kiev, Ukrainio. En la unua duontago okazos informado de junulara aŭditorio pri Esperanto.

En la dua duontago okazos ekskursoj, piedmarŝoj, distraĵoj. ✉ Volodimir Hordijenko, p/k35, UA-01133 Kiev, Ukrainio. ✉ <http://kes.ukrainio.org.ua>, volodomir@ukr.net.

novembro:

12-14: Semajnfinaj E-kursoj en pluraj niveloj en Herzberg, Germanio. ✉ (v. 01 maj).

18-21: KAEST 2010 (Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) en Modra-Harmónia, Slovakio, 30 km de Bratislava, en edukcentro de la Komenio-universitato. La temo: "Modernaj teknologioj por Esperanto". ✉ Peter Baláz (v. 02 jul). ✉ www.ikso.net/kaest, kaest@ikso.net.

27: 33-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, Nederlando. Prelegoj, filmoj, libroprezentadoj k.a. En la libroservo ĉio rabatita. ✉ (v. la kolofonon).

decembro:

10-12: 49-a Studsesio en Herzberg, Germanio. ✉ (v. 01 maj).



27 dec - 03 jan: 27-a IF, Internacia Festivalo en Nördlingen, Germanio. La tradicia aranĝo por familioj kaj plenkreskuloj. Kadra temo: "Lingvoj". Tuttaga ekskurso al Munkeno, la ĉefurbo de Bavario. ✉ Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio. ☎/✉ +49 56248007. ☎ +49 1714964558. ✉ www.internacia-festivalo.de; hdp@internacia-festivalo.de.



majo:

18-21: 8-a MEKARO - Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto en Kingston, Ontario, Kanado. Turisma amikeca semajnfino, vizitoj kaj komunaj manĝoj en restoracioj. ✉ (v. 22 maj 2010).

junio:

01-11: Printempa BARo 2011 (inkluzive Ĉieleniron) en Bad Münder inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. ✉ (v. 05 maj 2010).

julio:

23-30: 96-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, Danio.

Mapo de E-aranĝoj troviĝas ĉe:

www.Esperantoland.org.

Aktuala listo de konataj E-aranĝoj
daŭre konsultblas ĉe:
www.eventoj.hu

Malnova tragedio en novaj vestoj


Antigona. Jean Anouilh. Trad. Roger Imbert. Ĝurdevac: Grafokom, 2009. 67p. 21cm. ISBN 9789539697561. Prezo: € 10,50

Antigona (Antigono en la nova PIV!): "mita filino de Edipo, ĉefrolanta en tragedioj de Eŝilo, Eŭripido, Sofoklo, Racino kaj modernuloj." Post Jean Cocteau (1927) kaj Brecht, jen Jean Anouilh (1944).

Komence ĉiuj personoj estas sur la scenejo kaj "La prologo" prezentas ilin. Jen la ĉefaj: Antigona, kiu ekstaras sola kontraŭ la mondo kaj kontraŭ Kreono, sia onklo, kiu estas la reĝo. Ŝi pensas ke ŝi mortos. Hemono, filo de Kreono, parolas kun Ismena, fratino de Antigona. Li estas la fianĉo de Antigona. La gardistoj, la ĉiam memkontentaj helpantoj de justico...

La reĝo, Kreono, ordonis ke Polinicon, fraton de Antigona, oni lasu sen tombo, kiel predon al korvoj kaj ŝakaloj. Kiu kuraĝos lin laŭdeve honori per enterigo, tiu estos senkompatemortpunita.

Tiun ukazon Antigona rifuzas kaj ŝi provas doni tombon al sia frato. Kiam la gardistoj arestas ŝin, Kreono provas silentigi ŝian agon. Sed Antigona ne cedos. Kaj la Koruso fine anoncos: "... Ĉiuj jam mortis, kiuj mortontis. Kaj tiuj, kiuj kredis je unu afero kaj tiuj, kiuj kredis la malon – eĉ tiuj,



kiuj nenion kredis, kaj kiuj senkomprene estis forkaptitaj en tiun historion... Antigona estas kvietigita nun, de kiu febro, ni neniam scios. Ŝia devo estas plenumita..."

La traduko estas sufiĉe fidela kaj vigla, kun bedaŭre kelkaj rektaj eraroj, ekzemple, p. 8, dufoje la vartistino, kiu paroligas la patrinon de Antigona, diras "mi" anstataŭ "vi" (Ĉiam vi kriis kaj ĉiam vi donis al ili ovo-flavaĵojn); p. 9, kiam la vartistino diras al Antigona kaj al ŝia fratino Ismena: "Vi estas eĉ apenaŭ vestitaj. Kaj kompreneble vi 'kontraŭ mi koleris', anstataŭ 'vi malvarmumos' (france "vous allez encore

me prendre mal"). Ankaŭ kiam Kreono diras al Antigona: "Ĉar mi volas ke vi sciu pri la kulisoj de tiu dramo en kiu vi ardas ludi rolon, pri la 'kuirejo'" (p. 47). Ja "la cuisine" en la franca... kio signifas "la intrigoj"! Kaj poste ni retrovos la "kuiristo"-n anstataŭ "intriganto"-n... "Mi oferis al vi la unuan pupon" anstataŭ "donacis" (p. 37). Ĉar la tradukinto mortis kelkajn tagojn post la apero de tiu ĉi traduko, mi povas nur atentigi la eldoniston pri tiuj gravaj mistradukoj, okaze de eventuala reldono.


Jak Le Puil

Poeto bone reganta konservativan versarton

Vespere. Mikaelo Giŝpling. Enkonduko de Vladimir Samodaj. Moskvo: Impeto / Eŭropa Universitato "Justo", 2008. 126p. 17cm. ISBN 9785716101838. Prezo: € 6,00

Miĥael Giŝpling estas konata nomo inter legantoj de poezio, verkinto de kvar originalaj poemaroj ekde 1994. Lia lasta, *Vespere*, aperis en 2008, en lia 84-a jaraĝo. Giŝpling lernis Esperanton en siaj junulaj jaroj kaj aktivis en la sovetia movado dum kelka tempo, sed retiriĝis; li aperis denove sur la Esperanta kampo nur en 1990, kiam li komencis traduki poemojn el la rusa lingvo en Esperanton kaj, en la posta jaro, mem verki poemojn. Lia nova poemlibro enhavas kaj originalajn poemojn kaj tradukojn. La tradukoj prezentas poemojn de 13 rusaj poetoj kaj unu germana, Heinrich Heine, entute 41 poemojn, proksimume same multajn kiel la originalaj, el kiuj 8 jam aperis antaŭ nelonge en la antologio *Moskvaj sonoriloj*.

Giŝpling estas sentema kaj serioza poeto, sed ne aparte lirikisma; foje li esprimas pesimisman animstaton rekte,



sendevie: "Jam finiĝis miaj vagoj, / ŝutas neĝon frostaj vintroj / kaj forfluas miaj tagoj, / kiel akvo inter fingroj"; tian senesperon li tamen foje kontrŭbalancas per bonhumoro; en unu poemo li komparas sian vivovoĵon kun transpaŝado de zebroŝtria pasejo: nigro kaj blanko alternas, same espero kaj malespero, kaj fine oni povas esti danka, ke parto de la irita vojo ja estis blanka! Ĝenerale tamen la atmosfero de la tre diverstemaj poemoj estas iom morna, sed neniam elvokas cedon aŭ rezignacion, Giŝpling estas kuraĝa homo, plendemo estas al li fremda.

La temoj de *Vespere* estas ofte surprize interesaj. En "Promeno" li observas Goeton kaj Betovenon promeni kune, ili renkontas survoje la reĝinon de Aŭstrio kun dek korteganoj, Goeto ekstaras ĉevoje, nudigas la kapon, "flekŝigas kaj ree rektiĝas multfoje, / dum pasas reĝino kaj ŝia eskorto", sed Betoveno ŝovas sian

ĉapelon sur la frunton, digne firmigas sian plupaŝadon, tiel ke la eskorto devas cedi al li la vojon. Ne estas dubo, kies sintenon la poeto Giŝpling admiras. Al tia digna sinteno proksimas la indigno kaj kolero kontraŭ maljusto kaj kruelo en liaj politikaj versaĵoj, da kiaj kelkaj aperas en la libro.

Kelkaj poemoj priskribas kaj interpretas pentraĵojn de la granda artisto Isaak Levitan (1860-1900), kies koloraj kopioj akompanas ĉiun poemon; la naturaj, ofte iom mornaj motivoj de la belaj bildoj elvokas facile ja tristajn interpretojn, tamen pli celeme lirikismajn ol kutime en la poezio de Giŝpling. Plej impresa estas *Vladimirka*, landvojo, kiun trapasis siatempe miloj da homoj kondamnitaj al Siberio. La poeto meditas antaŭ la pentraĵo: "Jam foriĝis kri' kaj bojo, / malaperis tint' katena .../ Kaj denove la landvojo / kuŝas trista kaj malplena."

La plej longa kaj samtempe la plej kaptotena poemo estas la vizia kaj drameca *Transe*. Ĝi priskribas vojaĝon de la poeto post

la morto tra iuj transaj mondoj. Per 44 kvarversaj strofoj la poeto senhalte, sinpele, trapasas tiujn mondojn en epopece aktiva stilo, kiu neniam forlasas la atenton de la leganto. Kvankam la fino estas "profunda fend' / duoniganta grandan mornan rokon", al kiu la poeto ekpaŝas "forlasante la esperon", tio ne damaĝas la vojaĝon mem, kiu simbolas la multfacetecon de la vivo mem. Per tiu ĉi eksterordinara poemo Giŝpling klare montras, ke lia poezia talento inklinas pli nature al drameca rakonto ol al subtila lirikismo.

La poezian stilon de Mikaelo Giŝpling ne influis modernismaj tendencoj, sed li bone regas la konservativan versarton, kiun li ofte uzas efike pri konkretaj temoj daŭre aktualaj, kvankam rilataj al pasintaj kruelaĵoj (ekz-e en *Voĉoj el paseo*). Lia temara gamo estas vasta, tamen ĉiam motivita de personaj sintenoj, pensoj kaj sentoj, kiel ĝenerale estas konstateble ĉe bona poezio.

Baldur Ragnarsson

La ruĝbarbulo ege ruza... Jen libro nepre leginda!

Renardo Vulpo. Mezepoka bestepoeo. El la mezepoka nederlanda tradukis kaj en Esperanto prilaboris Pieter Jan Doumen. Hechtel-Eksel: P.J. Doumen, 2009. 164p. 21cm. Prezo: € 15,00

Iom mirigas la titolpaĝo: temas ja ne pri originala verko de s-ro Doumen, sed pri traduko-prilaboraĵo lia pri ege fama Mezepoka epopeo el la flandra-nederlanda literaturo *Van den vos Reynaerde*. Kial "traduko-prilaboraĵo"? Ĉar unuflanke estas traduko – enhave –, sed aliflanke – laŭ la forma aspekto – estas ne tute traduko: la mezepoka Nederlanda literaturo ofte uzas formon, kiun en Esperanto ne eblas inde redoni. Mezepoke oni ja uzis rimatajn versojn de malegala longeco kun iom stabila nombro da akcentitaj silaboj inter pluraj neakcentitaj. En Esperanto, se konsideri nian ĝisnunan literaturan tradicion, tio nepre aspektus harstarige ĥaose. Ankaŭ mem, tradukante *Beatrijs*, mezepokan Maria-epopeeton, siatempe mi elektis principe la saman solvon kiel Peter Jan Doumen: versoj sen rimoj, sed kun egala longeco. Do – tute bona solvo pri la forma aspekto!

La verko mem estas vera atuto de mezepoka literaturo ĝenerale: post la latinlingva epopeo samtema, ĝi estas la unua nacilingva pri la ruza vulpo, kiun plurlingve poste oni imitis – ne nur en la franca; poste eĉ Goethe provis rivali kun ĝi en siaj heksametroj germanaj!

Kiel ajn: Renardo estas leginda ruzulo, kiu kulpas pri pluraj murdoj – vulpo ja manĝas kokojn – sed kiu ne facile sin lasas superruzi. Plurajn gravulojn la reĝo de la bestoj, Reĝo Nobel la leono, elsendas por kunvenigi Renardon al sia kortego, kie oni procesu pri li kaj lia kulpo. Konate estas ekzemple, kiamaniere la urson Bruno li scias kapti: al Bruno Renardo kredigas, ke en dissplitita arbo en ĝia spalto¹ kaŝiĝas pura mielo... Kiam la urso ekflaras, la vulpo forpuŝas la kojnon el la spalto, la fendita arbotrunko ree kuniĝas kaj la buŝo de la kompatindulo estas kaptita... Multe da ruzaĵoj elpensas

ankoraŭ la vulpo por savi sin kaj sian familion.

Kutime la traduko estas sufiĉe bona, kvankam mi bedaŭras ke la traduko iom pli longas ol la originalo.

Tamen, precipe pri unu detalo en la teksto mi vere ekmiris: en paĝo 64 la origina *des papen son[s]* ([de] la filo de la pastro) estis tradukita kiel *la kirkservista filo*. Temas dum pluraj paĝoj pri aventuro cirkaŭ la loĝejo de tiu pastro, kiu – kiel pluraj siatempaj pastroj – senprobleme havis edzinon kaj ankaŭ idojn². Sed mirige por mi en la traduko tiu pastro – *pape* – ŝanĝiĝis je preĝeja pedelo / kirkservisto / sakristiano (p. 64, 66, 67). Je granda bedaŭro de sia edzino, atakate de nia ruĝabarba vulpo li perdas la "kariljonon".

Post pluraj aventuroj nia Renardo fine eĉ decidas entrepreni pilgrimadon.

Sed vi legu la tuton – vere estas verko edifa!

Kompreneneble, kiel atentigas Christian Declerck en sia *Rekomende*, tia verko bezonas enkondukon kaj notojn. Kaj da tiaj la tradukinto liveras plurajn, ne tro malavare sed ja informriĉe.


Pieter Jan Doumen estis instruisto mezlerneja pri la angla kaj la franca; kiel esperantisto li estas precipe aktiva en la Limburga Esperanto-Asocio. Tio ĉi estas lia unua granda traduko.

Gratulon al li. Eble – kaj bonvene! – li sentos instigon daŭrigi, kaj por tio volonte mi sugestu al li *Karel ende Elegast*...

Gerrit Berveling

1) *Fendo*.

2) *Malgraŭ pluraj lokaj aŭ diocezaĵaj reguloj kaj verdiktoj, vere deviga por la kompleta eklezio de Romo la celibato fariĝis nur de post la koncilio de Trento (16-a jarcento).*



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 6% por libroj kaj periodaĵoj kaj 19% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimуме 4,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Gisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo/.

Fondamenti di interlingvistika ed esperantologia.

Pianificazione linguistica e lingue pianificate.

Federico Gobbo. Milano: Cortina, 2009. 157p. 22cm. Itallingva. ISBN 9788870431414. La libro celas helpi la leganton respondi al la fundamenta demando "Kio estas lingvo?" € 18,90

Granda vortaro kroata-Esperanta / Veliki rječnik hrvatsko-esperantski.

Lucija Borčić. Zagreb: Hrvatski savez za esperanto / Sveučilišna knjižara, 2009. 488p. 25cm. Bind. Kromkovrilo. ISBN 9789537015497. Unudirekta vortaro kun ĉirkaŭ 57 000 leksikaj unuoj (kapvortoj + derivaĵoj). € 48,90

Jarkolekto Esperanto 2009.

Rotterdam: UEA, 2009. 264p. 27cm. Bind. ISSN 00140635. 11 numeroj. € 28,20. Triona rabato ekde 3 ekz.

Kontribuaĵoj de la

Komisiono Esperanto-Interlingvistiko.

Prezentitaj dum la sesioj

1995, 1997, 1999, 2001, 2003. Red. Minerva Bocşa kaj Mircea Popoviciu. Timișoara: Politehnica, 2005. 104p. 24cm. ISBN 9736252469. Programoj de la simpozioj kaj [koncizigitaj] tekstoj de prelegoj; kun rumanlingvaj resumoj. € 7,50

Kurso agrikultura.

Rudolph Steiner. El la germana trad. W. Nüesch. Berno: La tradukinto, 2009. 206p. 21cm. Serio de ok prelegoj prezentitaj de la aŭtoro en Koberwitz de la 7a ĝis la 16a de junio 1924. € 15,90

Liberiĝo de la juĝisto, La / La liberación del juez.

Ferenc Szilágyi. En la hispanan trad. J. Guerrero. Antaŭparolo de la tradukinto. Barcelona: Alpha Decay, 2009. 98p. 15cm. Du-lingva: E, hispana. ISBN 9788492837014. Moderna fablo pri la forto de sociaj strukturoj. € 6,00

Malta nuntempa poezio.

El la malta trad. C. Mallia. Valletta: Malta E-Societo, 2009. 54p. 30cm. ISBN 9789993266914. Poemoj de 43 nuntempaj membroj de Societo de Maltaj Poetoj. € 8,10

Meditado ĉe la sunleviĝo.

Omraam Mikhaël Aïvanhov. En Esperanton trad. V. Sladeček. Fréjus: Prosveta, 2002. 33p. 15cm. ISBN 2855665531. Enkonduko en meditado, kiun praktikadas la Universala Blanka Frataro. € 3,30

Ni vagu kune. Ĝardeno de porinfana poezio.

Bertram Potts. Chapecó: Fonto, 2009. 108p. 21cm. Kolekto de ĉarmaj porinfanaj poemoj rimaj kaj ritmaj. € 16,50

Pasporta Servo. La listo de gastigantoj de TEJO, 2010.

Rotterdam: TEJO, 2010. 208p. 15cm. Mapoj. ISSN 18797598. Kun 1450 adresoj en 91 landoj. € 9,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

Pet latica iz Osijek. Davor Klobučar. Osijek: Liberiga Stelo, 2009. 142p. 30cm.

Ilus. ISBN 9789539808141.

Kroatlingva verko pri kvin junulinoj en Osijek, kiuj estis la unuaj esperantistoj ne nur en tiu urbo, sed en Kroatio. Bona enkonduko en la historion de Esperanto en Kroatio. € 40,20





Podlaĥia antologio.

Red. Tomasz Chmielik kaj Jan Leończuk. Enkonduko de Dariusz Kulesza. En Esperanton trad. T. Chmielik, I. Ertl, L. Ligęza. Czeladź: Hejme – Libro-Mondo, 2009. 240p. 24cm. ISBN 9788392028987. Poemoj de podlaĥiaj aŭtoroj verkantaj pole, beloruse, ukraine aŭ litove. Kun ampleksaj bio-bibliografioj. € 16,80

Pri etik-ideoj de L.L.

Zamenhof. Henryk Witkowski. Toruń: Flamo, 2009 (3a eld.). 17p. 21cm. Pliampleksigita eldono de malnova eseo. € 2,10

Propraj nomoj, La / Les noms propres. Pledo por reveno al la Zamenhofa lingvo / Plaidoyer pour un retour à la langue de Zamenhof. André



Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2010. 35p. 21cm. Du-lingva studo pri tikla problemo. € 4,20

Ridu kun ni I. Kompilis Palmira Lukoševičienė. Panevėžys: E-klubo, 2009. 77p. 21cm. ISBN 9789955694830. Tre mallongaj tekstoj taŭgaj "por etuloj kaj plenaĝuloj". € 6,30

Sciencisto, esperantisto, patro: Eŭgeno Bokarjov. Antonina Bokarjova. Moskvo: Impeto, 2010. 143p. 20cm. Ilus. ISBN 9785716102071. Tekstoj pri kaj de unu el la ĉefaj figuroj de la sovetia E-movado, (re)-eldonitaj 105 jarojn post lia naskiĝo. € 6,00

Tri nigraj ŝipoj / Drei schwarze Schiffe / Tri černyh korablja. Margrit Vollertsen-Diewerge. En la rusan trad. E. Wedel,

N. Trockmann. En Esperanton trad. S. Hauge. Erlangen: La aŭtoro, 2009. 32p. 21cm. Tri-lingva (germana, rusa, E); ilus. ISBN 9783000294976. Ĉarma, instrua fabelo; kun akompana kd kun la tri voĉlegitaj versioj aperantaj en la libro. € 19,20

Vojaĝo al kuniĝo. Konfesoj de seksobsedito. Darik Otira. Novjorko: Mondial, 2010. 362p. 22cm. ISBN 9781595691514. Amo? Forgesu! Amoro estas pli grava en tiu ĉi originala romano, kiun, laŭ la leĝoj de multaj landoj, nur adoltoj rajtas legi. € 21,00

Zamenhofologio. Aktualaj problemoj kaj taskoj. Aleksander Korĵenkov. Kaliningrado: Sezonoj, 2009. 16p. 21cm. Ĝisdatigita teksto de prelego unue prezentita en 2007. € 3,00

Esperanto en plia libro

De tempo al tempo nia lingvo trafas en ne-Esperantaj eldonaĵoj, jen nur per sia nomo, jen iom pli. En 2008 la prestiĝa eldonejo Casterman publikigis la 124-paĝan bildstrian libron *Esperanto*.



Kvankam la rakonto mem ne rilatas al la verda lingvo, tiu ĉi aperas jen kaj jen. La rakonto temas pri la "Dua Mondo (tiel) Milito". Sur la fasado de granda entrepreno oni povas vidi "Potenco Elektro" kaj sur la tabulo de protestanto oni legas "Minus labori plus mono!", dum sur alia "Labor striko". Strato nomiĝas "Barakti Vojo" kaj butikŝildoj indikas "Modo", "Juvel" kaj "Oro". Sur mapo aperas iu lando aŭ provinco "Esperantia". El dialogo pri ĝi, ni ekscias ke "Ici tout le monde parle espéranto tandis que chez nous, seuls quelques idéalistes romantiques l'utilisent..." (Tie ĉi ĉiuj parolas Esperanton, dum ĉe ni nur kelkaj romantikaj idealistoj utiligas ĝin). Eble pro tiu manko de populareco, en la libro aperas ankaŭ kelkaj "eraretoj", kiel "Libros Bazarro", "Sxuo", "Kine", sed brokanta libro kun la Esperanta flago sur la kovrilo ja havas seneraran titolon: *Verda stelo*.

Fine de la libro, la aŭtoro, Otto Gabos, konfesas ke "Espéranto sonne bien, c'est une utopie qui m'a toujours fasciné. Pourquoi ne pas croire à un endroit où tout le monde aurait l'espéranto en langue principale?" (Esperanto sonas bele, ĝi estas utopio kiu ĉiam fascinis min. Kial ne kredi je loko kie ĉiuj havus Esperanton kiel ĉefan lingvon?) En tiu aldona parto videblas ankaŭ la kovrilo de task-kajero kun la nomo de la aŭtoro kaj la vorto "Esperanto" kaj bildo de *Corso di esperanto per l'Allievo e per l'Autodidatta* de Corrado Grazzini, apud la Esperanta flago kaj desegnaĵo kun la bildo de Zamenhof. **(IO)**

**VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE
NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM**

MALFERMA TAGO

sabaton la 17-an de aprilo 2010 (10h00 - 17h00)



- ☆ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ☆ Specialaj ofertoj

**Speciala gasto:
MARK FETTES**



- ☆ Bazarro de e-aĵoj
- ☆ Senpaga loterio
- ☆ Kafo kaj teo senpage servataj

**ISRAELA
KIES: E-semajno**

11-a Komuna Israela Esperanto-Semajn(fin)o – 20-22.5.2010. Por eksterlandanoj okazos tutsemajna turisma E-programo tra Israelo.

Informiĝu ĉe ELI: eli@esperanto.org.il
(P.O.K. 22041, IL-61220 TEL-AVIV)

ISRAELA ESPERANTISTO - enhavriĉa revuo, informas pri la Israela kaj judisma Esperantujo kaj multe pli! Nur 10 eŭroj inkl. sendokostojn. Kolora, 24p, dufoje jare. Mendu ĉe UEA. *Petu senpagan ekzempleron (n-ro 150: 2009) ĉe ELI.*

DUMVIVAJ MEMBROJ:

Germanio: P. Dubourg Glatigny. Pollando: K. Nemere-Czachowska. Svislando: M. Rosser.

SOCIETO ZAMENHOF:

Argentino: R. Calógero. Aŭstrio: S. Stamm. Belgio: G. Maertens, G. Ricci, K. Tytgat, M.-L. Vanherk. Bosnio kaj Hercegovino: S. Milojević. Brazilo: F.J.P. Maia, J.D. Pinto, A. Rabelo, A.S. Santos. Britio: G. Sutton, E.R. Waterworth, J. Wells. Danio: T. Bak, A. Birkbak, A. Casper-Mortensen, T. Gregers, E. Hjorth, K. Jørgensen, S.F. Jørgensen, E. Mortensen, B. Traerup. Finnlando: A. Harju, H. Laine, S. Mynttinen, V. Tikkanen. Francio: A. Albault, S. Amariglio, A. Andrieu, R. Boré (†), Sylviane & Henri Lafargue, A. Loisel, C. Longue-Épée, Louise & Jean Marin, H. Roy, G. Thomas. Germanio: A. Kronenberger, E. Kruse, Gisela & Georg Macioszek, I. Tautorat. Hispanio: J. Franquesa, L. Hernández, R. Urueña. Hungario: P.P. Denke. Israelo: J. Šemer. Italio: S. Lamberti, M. Lipari. Japanio: J. Akada, K. Deguti, Ciekio & Hirokaz Doi, H. Fukumoto, K. Hosomi, Y. Iyout, T. Kawakami, K. Kikusima, Y. Kuroyanagi, S. Kuzume, G. Pompilio, N. Sakurai, S. Simada, K. Simizu, T. Sugano, Keiko & Nobuyuki Syōzi. Kanado: B. Crisp, S. Norvell. Kroatio: B. Čović. Litovio: P. Jegorovas. Luksemburgo: B. Moon, C. Nourmont. Nederlando: W. Akkerman, G.A.M. van Bergeijk, L. Demmendaal, P. Engwirda, D. ten Haaf, M. v/d Horst-Kolińska, E.C. Klaver, M. Massar-van Diepen, J. Moonen, N. Overwater, G. Peet, S. Smits. Norvegio: D. Draper, C. Fossen, T. Jansson, T. Kvakland. Rumanio: A.B. Sabolciu-Sighismund. Svedio: S. Fritz, M. Haggström, L. Holmlund, U. Luin, L. Nordenstorm, S. Svenonius. Tajlando: D. Cohen. Usono: U. Becker, J. Edwards, G. Grady, Lucy & Bil Harmon, G. Novak, B.A. Sherwood, D. Simpson, R. Swenson, H. Tonkin, A. Victor, D. Wolff.

PATRONOJ DE TEJO:

Argentino: R. Calógero. Belgio: G. Maertens, A. Mechelynck. Brazilo: M. das Dore Barcellos. Finnlando: K. Hautamäki, A. Karkiainen, A. Kyttä, M. Laamanen, S. Mynttinen, T. Oittinen, J. Pietiläinen, A. Ritamäki, P. Saarinen. Francio: C. Longue-Épée, H. Roy. Germanio: G. Macioszek, F. Reisel, I. Tautorat. Hungario: P.P. Denke. Italio: G. Polerani, G. Zanoli. Japanio: H. Fukumoto, K. Hosomi, K. Kai, U. Kobayasi, S. Simada. Nederlando: L. Demmendaal, D. ten Haaf, K. Marciniak, M. Massar-van Diepen, F.J. Pieterse-Kruger. Norvegio: D. Draper. Pollando: M. Zak. Usono: G. Grady, F. Montenegro-Rodas.

DONACOJ

Ĝis la 15-a de februaro 2010:

Konto Afriko: Britio: J. Bunting 111,11. Finnlando: A.-L. Ali-Simola 7,00. Nederlando: C. & R. Bossong 50,00; T. van Huis-Staritsky 50,00. Svedio: J. Hammarberg 19,61. Usono: M.

Kennedy 95,24. *Sumo ĉi-jara*: 332,96.

Fondaĵo Ameriko: Francio: G. Martin 50,00. Islando: Islanda E-Asocio 50,00. Japanio: S. Tsubaki 95,24. Nederlando: T. van Huis-Staritsky 50,00. Usono: A. Bennett 34,40; P. Browne 35,77; G. Grady 14,31; J. Spickler 5,80. *Sumo ĉi-jara*: 335,52.

Fondaĵo Azio: Japanio: J. Akada 156,58; Y. Gotoo, K. Hirose, A. Hošida, M. Inada, M. Nakatu, T. Nishino, T. Saito, Y. Tanaka, T. Yamada, S. Yamamoto, M. Yasumura – po 14,90; T. Isikawa, H. Kunii, N. Nemoto, J. Oshima, A. Saiki, Y. Sasaki, T. Unoki – po 15,65; M. Nakajima 39,15; K. Murata 78,29; Z. Sibayama 30,55. *Sumo ĉi-jara*: 578,02.

Konto Novjorka Oficejo: Usono: P. Dolter, L. Gregg – po 13,76; G. Grady 14,31; R. Orsi 5,36; H. Tonkin 137,60. *Sumo ĉi-jara*: 184,79.

Fondaĵo Canuto: Aŭstrio: U. Stecher 20,00. Finnlando: A. Kuhanen 200,00; J. Pietiläinen 50,00. Francio: S. Ardouin, M.-T. Lloancy, B. Robineau – po 20,00; J.-J. Aumeunier 50,00; P. Bertrand 17,00; F. Dhersigner, J.-P. Schneider – po 30,00; F. Ditacroute 40,00; D. Hubert, J.-C. Trebouet – po 10,00; S. van Landeghem 7,00; D. Mackenzie Peers 18,00. Germanio: G. Macioszek 120,00. Nederlando: T. van Huis-Staritsky, R. Moerbeek, F.J. Pieterse-Kruger – po 50,00; T. Kaźmierski 10,00; R. Richardson 5,00. Svedio: Norrköpings E-klubb 150,98. *Sumo ĉi-jara*: 977,98.

Konto Espero (ĉiuj donacoj por Haitio): Danio: P. Weide 30,00. Finnlando: A. Karkiäinen 30,00. Francio: J. Catil 20,00; P. Dieumegard 100,00; G. Martin 50,00. Islando: Islanda E-Asocio 50,00. Italio: M. Lipari 50,00. Japanio: R. Huzimoto 10,00; M. Isaki 200,00. Kolombio: J.A. Diaz Ardila 73,00. Luksemburgo: I. Ertl 25,00; K. Ertl 15,00. Nederlando: M. v/d Horst-Kolińska, T. van Huis-Staritsky – po 50,00; K. Kováts 20,00. Rusio: I. Smikov 4,09. Slovenio: T. Longyka 50,00. Usono: D. Charters 35,77; F. Montenegro-Rodas 50,00; Piedad 69,52. *Sumo ĉi-jara*: 982,38.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Francio: S. Ardouin, B. Robineau – po 20,00; J.-J. Aumeunier 50,00; D. Catteau, C. Dufay – po 21,00; V. Courouble 13,00; R. Lebrun, J.-C. Trebouet – po 10,00; M.-T. Lloancy 40,00. Nederlando: T. Kaźmierski 10,00. *Sumo ĉi-jara*: 215,00.

Volontula Fondaĵo: Nederlando: F.J. Pieterse-Kruger 50,00. *Sumo ĉi-jara*: 50,00.

Ĝenerala kaso: Brazilo: N.C. da Silva 5,96. Francio: A. Amice 60,08; N. Guironnet da Massas 22,00. Germanio: J. Radam 40,00; A. Schubert 20,00. Usono: P. Lynch 14,31. *Sumo ĉi-jara*: 162,35.

Al ĉiuj koran dankon! UEA



EEU renkontis en Bruselo la prezidanton de Eŭropa Parlamento

Por festi la 150-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, Maĝorzata Handzlik aranĝis ke delegacio de Eŭropa Esperanto-Unio renkontu la EP-Prezidanton Buzek, eks-ĉefministron de Pollando (1997-2001), en la Eŭropa Parlamento en Bruselo la 13-an de januaro 2010.

Ĉeestis Maĝorzata Handzlik, Jozef Reinart, vic-ambasadoro de la slovaka ambasado en Belgio, kaj Seán Ó Riain, prezidanto de EEU.

EEU faris du konkretajn petojn al Buzek: a) ke li fariĝu patrono de la hamburga EEU-konferenco "Kia estus Eŭropo se neniam estiĝus EU?", elpensita de Zlatko Tišljar kaj planita por majo 2011, kaj ke li prelegu dum ĝi; b) ke li malfermu diskuton en EP dum la jaro 2010 por honorigi alian grandan polon, profesoron Bronisław Geremek, kiu tragike mortis en akcidento la 13-an de julio 2008. La temo povus esti simila al tiu de la geremeka diskuto de 2008 (*Esperanto: amiko aŭ malamiko de plurlingveco*), ĉar nun temas pri nova Eŭropa Parlamento, kaj Maĝorzata Handzlik pretas inviti siajn kolegojn. La prezidanto promesis favore konsideri ambaŭ petojn.

Maĝorzata Handzlik mallonge kaj trafe prezentis la ideojn de EEU, aparte la proponon de formala inter-registara diskutado de eŭropa lingvopolitiko, kiun faris slovaka vic-ĉefministro Čaplovič en 2007. Jozef Reinart substrekis la daŭran politikan aktualecon de tiu propono, per ekzemploj el Slovakio, Hungario, Belgio ktp. Seán Ó Riain altiris la atenton al la lernfaciligaj ecoj

de Esperanto, ekzemple de la *Springboard*-projekto en Britio, kaj proponis rolon por Esperanto por plibonigi lingvolernadon kaj plifortigi tuteŭropan identecon, harmonie kun la naciaj kaj regionaj identecoj de la EU-membroŝtatoj. La prezidanto montris grandan intereson, kaj alte taksis la politikan realismon de EEU, kaj la fakton ke ĝi celas realan, eĉ se unue modestan rolon por Esperanto en la kunteksto de la multlingva Eŭropo.

EEU prezentis al Prezidanto Buzek kelkajn gravajn librojn donacitajn de UEA, inter ili *Encyclopaedia of the Original Literature of Esperanto* de d-ro Geoffrey Sutton; *La Zamenhof-Strato* de Roman Dobrzyński kaj Ludoviko Zaleski-Zamenhof (en la pola); *Ĉio komenciĝis ĉe la Verda*; *Interkultura Dialogo kaj Komunikado* – la referaĵoj de EEU-konferenco *Alieco kiel Valoro* de 2007; la DVD de *E@I Esperanto estas* Seán Ó Riain prezentis ekzempleron de la impona festlibro *La Arto labori kune*, kiun Humphrey Tonkin dediĉis al Buzek kaj kiu aparte impresis lin (sur la foto). La prezenton kompletigis dosiero de Maĝorzata Handzlik, kiu entenis la rezolucion de la Pola Sejmo de la 12-a de junio 2008 okaze de la centjariĝo de UEA; la inviton de prof. Geremek al ĉiuj EP-anoj de la 4-a de julio 2008 al diskuto pri Esperanto (lia lasta mesaĝo al siaj gekolegoj antaŭ la mortiga akcidento); kaj la Eŭropan Himnon, kun vortoj de Umberto Broccatelli, elegante enpoligitan de Georgo Handzlik.

Prezidanto Buzek aparte zorge legis la Eŭropan Himnon en ĝia pola traduko, kaj komentis ĝin favore: li konsentis kun la enhavo, kaj opiniis la regulan kantadon de tiu himno en Esperanto utila al plifortigo de tuteŭropa identeco.

Seán Ó Riain

Ekspozicioj en Finnlando



Komence de la jaro 2010 Esperanto-societo en Turku havis la eblon aranĝi ekspozicion pri Esperanto en la ĉefbiblioteko de Turku kaj poste en la ĉefbiblioteko de la najbara urbeto Kaarina.

La ekspozicioj portis la nomon *Esperanto, kiehtova kiel* (Esperanto, fascina lingvo) laŭ la broŝuro de **E@I**.

En Turku la ekspozicio troviĝis dum 05-31.1.2010 en la dua etaĝo de la biblioteka konstruaĵo.

Esperanto estis prezentita multflanke pere de ok grandaj afiŝoj kaj multaj kongresaj bultenoj, libroj,

informis pri la ekspozicioj.

Inter la gazetoj legeblaj en la ĉefbiblioteko de Turku troviĝas i.a. revuo *Esperanto*, *La Ondo de Esperanto*, *Esperanta Finnlando* (finne: *Esperantolehti*) kaj Informilo de nia societo *EST*. Ankaŭ en la ĉefbiblioteko de Kaarina troviĝas bretaro kun donacitaj esperantlingvaj gazetoj.

Koran dankon al ĉiuj kiuj helpis nin ebligi la ekspozicion. Specialan dankon al Stano Marček, kiu sendis fotojn je nia dispoŝo kaj al Tuomo Grundström k.a. pro kontrolo de la afiŝaj tekstoj.

Tiina Oittinen, prezidanto
Esperanto-societo en Turku (EST)

La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK)

- ◆ bela marborda situo, en mondfama universitato
- ◆ trisemajna intensa lernado de Esperanto
- ◆ du niveloj: meza kaj supera
- ◆ internaciaj instruistaro kaj studentaro
- ◆ riĉaj vesperaj kaj semajnfinaĵaj programoj

Datoj: 28 junio – 16 julio 2010.

Loko: Universitato de Kalifornio, San Diego (UCSD).

Instruistoj: Katalin Kováts (Hungario/Nederlando), Lee Miller (Usono), Grant Goodall (Usono) kaj gastparolantoj: Amri Wandel, Orlando Raola kaj Duncan Charters.

NASK okazos kvara-foje en sud-Kalifornio. La instruistoj pretigas dunivelan studprogramon kiu emfazos la aktivan uzadon de Esperanto kaj enprofundiĝon en la Esperantan kulturon. Oni povas perfektigi sian Esperanton kaj facile iri al Havano poste por la UK 2010.



Speciala kotizo por studentoj kaj instruistoj! Stipendioj haveblas.

Trovu pli da informoj en <http://esperanto.org/nask>, aŭ skribu al la kunordiganto: Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512, Usono. ☎ (+1) (360) 754-4563; ✉ eddyellen@aol.com.

Amir Bashir Bhatti (1958-2010), eksprezidanto de Pakistana Esperanto-Asocio, mortis la 10-an de januaro en Multan.

Raymond Boré (1925-2009), komisiito de UEA pri Zamenhof/Esperanto-objektoj (ZEO-j), forpasis la 6-an de februaro en Chambéry, Francio. Dum multaj jaroj li kunlaboris kun Hugo Röhlinger pri la registrado de ZEO-j kaj en 2001 daŭrigis lian laboron kiel komisiito. Li mem vizitis multajn ZEO-jn por foti ilin por sia kolekto. En sia hejmurbo li atingis decidon de la magistrato nomi la placon, ĉe kiu li loĝis, Skvaro Zamenhof. Li estis delegito ekde 1986. Krom dumviva membro de UEA, li estis regula membro de Societo Zamenhof kaj ekde 2001 Dumviva Patrono de UEA. Pro la meritoj de Boré la Estraro de UEA ĉi-jare premiis lin per Diplomo pri Elstara Agado, sed la sorto ne plu permesis aranĝi ĝian personan transdonon al li. En 2005 Boré ricevis ankaŭ la Premion Ada Sikorska Fighiera.

Umberto Broccatelli forpasis la 11-an de februaro en Romo. Eklerninte la lingvon en 1947 li tuj ekaktivis movade kiel unu el la refondintoj de Bolonja Esperanto-Grupo. Li kunorganizis nacian kongreson en Bolonjo en 1952 kaj la 40-an UK samurbe en 1955. De 1980 ĝis 2005 li membris en la Nacia Konsilio de Itala Esperanto-Federacio kaj plurfoje elektigis al ĝia estraro. De 1989 ĝis 2002 li redaktis la organon de IEF, *l'esperanto*. Kiel fervora pledanto por la eŭropa unuiĝo li tradukis *La Manifesto de Ventotene* (1981) kaj iniciatis la aliĝon de IEF al la Itala Konsilio de la Eŭropa Movado, en kies komitato li reprezentis IEF. En 1999 li reaktivigis Eŭropan Esperanto-Union, kiun li prezidis, ankaŭ redaktante la informilon *Eŭropa Bulteno*, de 1999 ĝis 2004, kiam li iĝis honora prezidanto de EEU. Li aŭtoris la vortarojn *Vocabolario Esperanto-Italiano* (1984)



kaj *Dizionario Italiano-Esperanto Esperanto-Italiano* (2004), kaj la lernolibron *Nuovo Corso di Esperanto per allievi e autodidatti* (1993). Pri lingvaj demandoj de Esperanto Broccatelli verkis multajn artikolojn kaj la broŝuron *Esperanto, lingvo planebla* (1996). Li esperantigis beletraĵojn, i.a. por *Itala antologio* (1987). Liaj lastaj tradukoj estis la romano *La ĵurnaleto de Joĉjo Tempesto* kaj sonetoj de Giuseppe Gioachino Belli. Broccatelli fariĝis Honora Membro de UEA en 2006.

Camiel De Cock (1932-2009), dumviva membro de UEA, iama fakdelegito pri naturismo, forpasis en Halle (Belgio).

Gerard Cool (1921-2009) forpasis la 25-an de novembro en Leibnitz (Aŭstrio). Dumviva membro de UEA, li estis fakdelegito pri matematiko kaj klasika muziko ekde 1967, kaj delegito en Wasserwendl (Svislando) 1971-1987. Li verkis la sciencfikciajn *Sava la Saventino* (2000), *Mond-sav-plano* (2000), *La misio de Sava* (2001), *La homaro inter 2160-3600* (2002) kaj *La homaro post 5040 jaro* (2003), kaj, instruisto pri matematiko, la fakajn verkojn *Proponaro de geometria terminaro gimnaznivela* (1982), *Nova strategia ludo: geo-ludo* (2004) kaj *Geometrio de simplaj enhavoj* (2004), kaj multajn artikolojn pri lingvaj, matematikaj kaj sociaj temoj.

Enrique Gonzalez (1928-2009), veterana argentina esperantisto, forpasis en Mendoza la 14-an de septembro.

Dimitar Haĝiev (1920-2009) mortis la 26-an de decembro en Sofio. Li longe servis kiel diplomato kaj estis fakdelegito pri paco, internacia juro kaj internaciaj rilatoj. Haĝiev abunde artikolis por Esperanto-revuoj kaj estis honora membro de Bulgara Esperanto-Asocio.

Gerhard Hirschmann (1939-2009), em. vendodirektoro, forpasis la 14-an de decembro en Magdeburg (Germanio), kie li estis fakdelegito pri merkato, mondĉivitanismo kaj telekomunikado. Aktiva kunlaboranto

en la Afrika Agado de UEA, li precipe dediĉis sin al mondĉivitanismo, i.a. kiel direktoro de la Esperanta sekcio de Asocio de Mondĉivitanoj.

Johannes U. Hommes (1908-2010), em. instruisto, forpasis 101-jara la 11-an de februaro en Apeldoorn (Nederlando). Li estis membro de UEA ekde 1947 kaj de la sama jaro ĝis 1987 delegito kaj ĝis sia forpaso fakdelegito pri evangelia kristanismo.

Io Chou (1912-2008) mortis la 16-an de decembro 2008 en Yangling, Shaanxi-provinco (Ĉinio). Io Chou, kiu esperantistiĝis en 1926, estis monde prestiĝa entomologo, kiu ofte provizis siajn artikolojn k.a. verkojn per Esperanta resumo. Li prelegis dufoje (1982 kaj 1986) en Internacia Kongresa Universitato kaj aperigis la libron *Ĉinio marŝas en insekta mondo* (1986).

Juliusz Kolbusz (1919-2010), estrarano de la filio de Pola Esperanto-Asocio en Tarnów, mortis la 14-an de januaro.

Jakov Krpan (1919-2009) mortis la 8-an de aŭgusto en Karlovac (Kroatio), kie li estis delegito kaj fakdelegito pri marksismo.

Liliane Laprise (1931-2009), dumviva membro de UEA, mortis la 8-an de

decembro en Trois-Rivières (Kanado).

Evald Olsson (1923-2009), em. ĵurnalisto, mortis la 26-an de julio en Bengtsfors (Svedio), kie li estis delegito.

Konstantinas Puodenas (1923-2009) mortis la 22-an de decembro en Vilno. Li esperantistiĝis en 1938. Ekde 1959 li estis sekretario de E-klubo de Vilno. Li aperigis Esperantan-litovan vortareton (1969) kaj dudirektan vortaron (1988). Ampleksa dudirekta vortaro pretas kiel manuskripto. Li tradukis la romanon *Arbaro de Dioj* de B. Sruoga kaj kompilis instruprogramon de Esperanto por mezlernejoj.

Johanna Scheffs (1914-2009) mortis la 18-an de decembro en Potsdam (Germanio). Ŝi longe prezidis la distriktan organizaĵon de Esperanto-Asocio de GDR en Potsdam kaj estis estrarano de GDREA.

Josip Šlat (1932-2009) mortis la 14-an de decembro en Zagreb. Li estis dumviva membro de UEA kaj, profesie varkontrolisto, iam fakdelegito pri komerca eksporto.

Taisto Suontausta (1928-2009) mortis la 17-an de decembro en Vääksy (Finnlando), kie li iam estis delegito kaj en la 60-aj kaj 70-aj organizis popularajn somerkursojn de Esperanto.

Raymond Boré forpasis...

Forpasis Amiko. Forlasis nin Samideano. Forlasis nin Homo modesta, kiu tutan sian vivon dediĉis al Esperanto, serĉante nenian personan gloron. Reciproke, Esperanto lian vivon plenigis.

Tra la tuta mondo li serĉadis ZEOjn, la Zamenhof / Esperanto-objektojn, kaj fiere ilin listigis. En sia urbo li kreis ankaŭ mem ZEOjn. La adreso de lia hejmo sekve estiĝis Skvaro Zamenhof; danke al lia penado estis starigita en Chambéry la Zamenhof-monumento.

Per sia lasta volo li postlasis al mi imponan arkivon de fotoj kaj dokumentoj rilatantaj al Zamenhof

kaj ankaŭ al liaj familianoj: pli ol tricent objektojn, ofte ununurajn, kolektitajn dum pluraj jardekoj. Mi mem intencas postlasi siatepe tiun senkompare valoran kolekton al la Centro Zamenhof lastjare inaŭgurita en Bjalistoko. La nomo de Raymond Boré estos sekve tiuloke eternigita apude de Zamenhofoj. Adiaŭ Raymond! kara, ripozu en paco!

Louis C. Zaleski-Zamenhof



FESTLIBROJ

GRANDIOZA PANORAMO



Okaze de la 70-a datreveno de unu el la plej elstaraj esperantistoj de la lastaj jardekoj, Humphrey Tonkin, UEA eldonis tiun ĉi panoramon de diverstemaj artikoloj de 106 aŭtoroj. Pinta eldona omaĝo al la pinta aganto.

LA ARTO LABORI KUNE. Festlibro por Humphrey Tonkin. Red. Detlev Blanke kaj Ulrich Lins. Rotterdam: UEA, 2010. 901 p. 25cm. ISBN 978 92 90171133. Prezo: € 60,00. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

DUOBLA JUBILEO




Okaze de la 75-a datreveno de du el la plej elstaraj aŭtoroj Esperant-lingvaj, William Auld kaj Marjorie Boulton, UEA eldonis kolekton de diverstemaj eseoj verkitaj de 23 aŭtoroj.

LINGVA ARTO. Jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton. Red. Vilmos Benczik. Rotterdam: UEA, 1999. 5+217p. 21cm. ISBN 929 017064 6. Prezo: € 16,50. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

MEMORLIBROJ


ABUNDA KOLEKTO



85 jarojn post lia naskiĝo, konatoj kaj amikoj omaĝas unu el la plej gravaj esperantistoj de Hungario. Pli ol 40 aŭtoroj pere de kvindek da eseoj diverstemaj omaĝas profesoron István Szerdahelyi.

ABUNDA FONTO. Memorlibro omaĝe al Prof. István Szerdahelyi. Red. Ilona Koutny. Poznań: ProDruk & Steleto, 2009. 407p. 24cm. ISBN 978 83 6160732 8. Prezo: € 24,00. Sesona rabato ekde 3 ekzempleroj.

SINCERA OMAĜO



Memorlibro honore al unu el la plej influaj koreaj esperantistoj. Aldone al materialoj pri la vivo kaj agado de Lee, la libro enhavas ankaŭ ĉapitron pri liaj verkoj kaj kontribuadojn de diverslandaj esperantistoj, kiuj konis lin.

LEE CHONG-YEONG, GVIDANTO NIA. Red. Kim Uson, Choe Taesok, Song Ho-young. Seulo: Korea E-Asocio, 2009. 280p. 23cm. ISBN 978 89 9728 270 1. Prezo: € 10,20. Sesona rabato ekde 3 ekzempleroj.



CRInline
国际在线 世界语网 **esperanto.cri.cn**

Ĉiun tagon ĈRI parolas
Esperantolingve pri ĉio
En la mondo kaj en Ĉinio
Kaj kiel amikponto rolas.

Esperanto

Vizitu Forumon

Nomo

Pasvorto

Esperanto ĈRI

Ĉefpaĝo | Novaj kaj komentoj | Fenestro de Ĉinio | Interreta Radio | Elektroniklibro | E-Klubo | Ĉina Enciklopedio



Esperanto service, CRI-36
China Radio International
P.O. Box 4216 Beijing, China 100040
Tel: +8610 68891940
Fakso: +8610 68891164
E-mail: espradio@cri.com.cn

向世界介绍中国，向中国介绍世界，向世界报道世界
Ni konigas Ĉinion al la mondo kaj la mondon al
Ĉinio, kaj raportas pri la mondo al la mondo.

La E-retpaĝaro de ĈRI estas la plej ampleksa retservo en
Esperantujo. Post la renovigo ĝi havas pli da funkcioj: la
interreta radio faciligas la aŭskultadon kaj bonvenigas
kontribuon de samideanoj, kaj la E-klubo atendas vian aliĝon.



Interreta Radio

plezurigo, ĝuigo kaj emocio,
oportuno kaj faciligo en ĉio.



Fenestro de Ĉinio

konigas la grandan landon,
vigle disvolvatan kaj modernigatan.



Bonvole vizitu
→ **E-Klubon** por amikiĝi
kun alilandaj samideanoj!



点击这里, 走进 **中国**
点击这里, 走向 **世界**

Klaku ĉi tie por eniri Ĉinion
Klaku ĉi tie por koni la tutan mondon